

中國新道

EL POPOLA

CINIO

EL POPOLA CINIO

人民中國報導

EN TIU CI NUMERO:

Laboristoj Pengas Kon-
atral Novan Ĉinion
Movado por Nova Rekordoj
en Produktado

Nova Vivo de Liberigitaj
Prostituitinoj en Pekino

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio: 26 Kuo H

VOL. 1 N.RO 1




NTOJ

ago de la trio de
krut-kapitalismo,
militara sklaveco,
da kiel unu homo
la gvidado de la
sio, kun sia 473
ligis al la monda
atio, kaj ĉio ĉin

voias sin retiri el
arantaj sian lastan
ado la ankoraŭ ne-
ormosa kaj Tibeto,
polus Respublikon
ropiana bombarde.



la plej gravaj ofi-
popola Liberecoj Ari
popolon okazigi cel-
protektis la labor-
tulokore. Estis la
sian ferion en libe-



revolucio de Ĉinio
la renkelaj klasoj
popolaj fortoj, kaj
Ĉi tio estas la unu-



...Krom en legi k legigi, ni esperas, la
tenataj materialojn vi ankaŭ utiligu en kun-
...reparigu en viaj esperantaj gazetoj kun
...pri la deveno, ni traduku nacilingven kaj
...perigite en viaj nacilingvaj jurnaloj aŭ gazetoj,
...dante kiujn artikolojn el kiuj numeroj de nia
...zeto vi tradukis. Sendu al ni bonvole al nia
...ekzemplaron de tiu nacilingva gazeto
...araboj, en kiu aperas la ajn tradukoj.
...Al tiuj, kiuj utiligas niajn materialojn, ni
...kompetencas per donaco de nia gazeto. Ni
...peciale taksas nin al TELA-membroj ke ili kiel
...laborantoj en jurnalistika kampoj multe utilig

...Krom en protektataj povas multaj ager-
...ago en Tibeto, lernejoj, polico,
...la popolan Majan laboran
...aj signifas estas liber-
...planojn en kun ili me-
...linaj en
...ino, la def-
...popola sur la hi-
...aeno) anti-
...Majtago kaj
...disigis
...sian kaj
...ting kaj
...staris su-
...Urbo.
...skuis la
...aj post la
...rado kome-
...naraj kaj
...ignitaj ur-
...j en siaj
...pejalna aj-
...oi de plu-
...iradantoj l
...atoj de la
...kampara
...bliksekure-
...taj flagoj
...kondukis
...loj, vestit
...paradant
...portretojn de Maŭ Zet-
...kaj Engels,
...Lenin kaj Stalin. Ĉiu unu
...salutata de
...Prezidanto Maŭ kaj respon-
...ditante sian kapoleon
...en la areon kaj rimarkante
...goje, ĉi tiu prezidanto
...fora en
...la 1-a respubliko de
...rezoj kaj
...surdigaj kampoj kaj
...logon
...daktis tra la marbordo.
...Esprimoj de unuoco kun la laboranta klaso de
...Antan ĉio, la projekta ligo klare difinas, ke
...sindikatoj estas amasorganizaĵoj de la laborista klaso
...organizataj sur memvola bazo. Ĉiuj dungataj lab-
...listoj devas aliĝi al sindikatoj.
...Sindikatoj havas la rajton reprezenti lab-
...laboristojn en administrado de publi-
...kaj en entreprenoj kune funkciantaj
...publikaj privata kapitalo. Ili ankaŭ havas
...rajton subskribi kolektivajn kontraktojn kun
...administracioj en la entreprenoj.

1950-1990


GRATULAJ PENTRAĴOJ



Prospero de CAO MINGRAN



40-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



Akvolando de ZHENG SHUFANG



Cevaloj de ZHAO CHENGMIN




Dancanta gruo de FU JIABAO

40-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



Printempaj floroj de ZHANG SHIJIAN



Maljunulo rigardas foren en alta loko. de LI YANSHENG

En aŭtuno de ZHANG RENZHI




Argila metiartaĵo Farita de ZHANG CHANG



Pepado de SHI MEIDING



Galopo de SONG GUANGSEN





Teksto por la dorskovrilo

Memoraĵoj por la 40-jara jubileo de EPC

Okaze de la 40-jara jubileo de EPC ni faris insignojn kaj sakojn.

La insignoj havas bildon de fluganta blanka kolombo el tri Esperantaj literoj, kiu montras, kiel antaŭe, la deziron de EPC senlace labori por la mondpaco, homa feliĉo kaj socia progreso.

La sakoj estas en formo de brokaĵa sako de tuĝjanacieco de Ĉinio. Tuĝjanacieco havas longan historion kaj tuĝja-oj vivas ĉefe en okcidentaj Hunan- kaj Hubei-provincoj kaj orienta Sichuan-provinco. Jam en la infanaĝo la knabinoj de la nacieco lernas brokadon. La brokaĵo estas delikata, kun desegno kruda, modesta kaj viveca, havas densan kamparan guston kaj fortan naciecan karakterizaĵon. Antaŭ 1 000 jaroj tia brokaĵo servis kiel tributo al la Imperiestra Palaco. La bildoj de la sakoj estas brako, fenestro kaj vesperto, kiuj simbolas bonaŭguron en Ĉinio.

La sakoj estas faritaj de la Hunan-a Brod-Instituto, el buntaj koton- kaj lan-fadenoj, en kombino de brokado kaj brodado, kun originala arta stilo.

En ekscitiĝo de LIU HAN

ENHAVO


40-jara jubileo de EPĈ

- 2 Gratulaj pentraĵoj
- 10 Gratuloj kaj bondeziroj
- 13 Kiel EPĈ estis lanĉita?
- 15 Al la esperoplena verdejo
- 16-19 **MI KAJ ĈINIO:**
 - Leciono
 - Mia bildo pri Ĉinio
 - Retrospektive al la 40 jaroj de EPĈ
- 20 De 158 000 al 60 000 000 tunoj da ŝtalo
- 34 **VOJAĜO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO (2):**
- Moderna agrikulturo en ĝermado
- 46 **INTERVJUOJ:**
- Sopiro al kampoj
- 49 **ĈINA LITERATURO:**
- La tria ĉapitro el "Songô en la Ruĝa Buduaro"
- 31 **POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO:**
- Pri la poemo "Matene, adiaŭo al Lin

- Zifang ĉe Jingci-templo"
- 25 Denove en neĝa vintro
- 53 **POR VIA SANO:**
- Ĉina ĉigong-o (I)
- 60 **IMPERIESTRA PALAĈO (9):**
- Yangxin-halo kaj "Postkurtena Regado"
- 41 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (12):**
- Yibin, la pordo de Sichuan kaj Yunnan
- 39 Turniĝanta lanterno
- 38 Bakitaj batatoj de Pekino
- 55 **AMUZOJ**
- 58 **NIA MONDO:**
- Religiaj ritoj en Japanio
- 46 **INTER NI:**
- 30 **ESP-NOVAĴOJ**
- 56 **KURANTAŬ AFEROJ**
- SUR LA KOVRILO:**
- Retrospektive al EPĈ
- SUR LA DORSKOVRILO:**
- Insignoj kaj memoraĵoj por la 40-jara jubileo de EPĈ

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Shunde-gubernio
- 2. Nanhai-gubernio
- 3. Xinhui-gubernio
- 4. Zhongshan
- 5. Dongguan
- 6. Harbin



Gratuloj kaj bondeziroj

Okaze de la 40-jara jubileo de EPĈ ni ricevis multajn gratulajn leterojn kaj artikolojn de niaj legantoj. Ni kore dankas ilin!

Iliaj leteroj kaj artikoloj rememorigis nin pri la kreskado de EPĈ en la pasintaj 40 jaroj. En tiuj jaroj niaj legantoj multe subtenis nin kaj kontribuis al la revuo. Hodiaŭ iliaj leteroj kaj artikoloj faris la jubileon pli signifplena kaj kuraĝigas nin pli bone labori.

Sed pro la limigita spaco ni aperigas nur parton de ili en ĉi numero.

La Red.



Estimata Redakcio,

Okaze de la kvardekjara datreveno de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio", kaj nome de la Akademio de Esperanto, mi deziras al via redakcio kaj al via publikaĵo prosperon kaj plian disvolviĝon en la venontaj jaroj serve al la diskonigo de la ĉinaj kulturaj valoroj, al la interkompreno de la popoloj kaj al la monda paco.

D-ro ANDRE ALBAULT
(Prezidanto de la Akademio de Esperanto)

Estimataj,

Okaze de la kvardekjara datreveno de ĝia fondiĝo, ni deziras esprimi sinceran gratulon kaj bondezirojn por la daŭra regula apero de tiu tre bela revuo, kiu ĉefe sukcesis ege evolui en la teknika kvalito kaj aspekto. Oni povas ĉie ĝin montri kiel ekzemplon de la kvalito kaj belo.

Por la Plenum-Komitato de SAT:

KREŠIMIR BARKOVIĆ (ĝen. sekretario)

Karaj geamikoj,


Okaze de la proksimiĝanta jubileo de El Popola Ĉinio mi elkore gratulas al la redakcio kaj al la aliaj kontribuantoj, kies merito estas la enhavoriĉa, lingve modela kaj belaspekta revuo. Mi forte esperas, ke vi sukcese daŭrigos ĉi tiun laboron.

Dum mia movada agado mi ekkonis multajn homojn, trovis aron da amikoj, sed inter tiuj la ĉinaj esperantistoj nepre apartenas al la plej memorindaj. Mi esperas, ke ankaŭ estonte la ĉina movado bone evoluos, ja tio estas grava intereso de la tuta movado.

Kore via:

FLÓRA SZABÓ-FELSŐ (Hungario)





La 40-jara jubileo de EPĈ Havas Grandan Signifon

Kiam mi decidis lerni Esperanton, min forte instigis la numeroj de El Popola Ĉinio, kiuj troviĝis en ekspozicio pri Esperanto organizita de la loka grupo en Kolonjo. Tio estis komence de 1958, kiam EPĈ ĵus reaperis post kelkjara deviga paŭzo. Por juna germano tiutempe estis malfacile rekte konsulti eldonaĵon el Ĉinio — kiom pli min ekscitis la fakto, ke Esperanto ebligas al mi tiun aliron! Poste mi regule legis la revuon, eĉ dum la jaroj de la t.n. kultura revolucio. Mi sukcesis akiri ankaŭ la unuan gazetformatan numeron de EPĈ, aperintan en majo 1950, do antaŭ kvardek jaroj.

EPĈ ne estas organo de la Esperanto-movado, sed ĝin eldonas registara institucio (*Fakte ĝi estas subvenciita de la ĉina registaro. — La Red.*). Tio metas al ĝi certajn limigojn, foje pli okulfrapajn, foje malpli rimarkeblajn. Aliflanke, ĝia multjara aperado atestas pri la respekto, kiun la ĉina registaro montras al la esperantistoj tra la tuta mondo. La registaro komprenis, ke valoras subteni la Esperanto-movadon, kiu per la uzo de neŭtrala lingvo klopodas pleniĝi per vivo tion, kion la ĉinoj nomas “popola diplomatio”. Tial la kvardekjara jubileo de EPĈ havas grandan signifon.

ULRICH LINS
(Vicprezidanto de UEA)



EPĈ Laboras por la Interkompreniĝo de la Popoloj

Per la bone redaktita revuo EPĈ miaj scioj pri la granda Ĉinio kaj ĝia popolo pli kaj pli perfektigis, ĉar la revuo enhavas zorge prilaboritajn kontribuadojn el ĉiuj terenoj de la ĉina vivo. Krome mi miras pro la bona klara lingva stilo de ĉiuj artikoloj, mirige, ĉar Esperanto ja estas tute fremda lingvo por ĉinoj. Do, EPĈ donas ankaŭ lingvan modelon al ĉiuj legantoj.

EPĈ laboras en laŭdinda maniero por la interkompreniĝo de la popoloj.

BRUNO VOGELMANN
(Honora membro de UEA,
aŭtoro de LA NOVA REALISMO)

VASILJEV O.A (Sovetunio):

Dediĉo

(Al la 40-jara jubileo de Popola Ĉinio kaj revuo “EPĈ”)

*Oh, fabela lando
Kun antikvaj moroj.
Donacis al homaro
Vi, inventojn orajn.*

*Pulvo kaj papero,
Kompaso kaj presarto.
Via jen fiero
Estas ĉina lando.*

*Estas silka vojo
Fama en la mondo,
Kiel ŝtona rojo
Tiriĝas muraj ondoj.*

*Preter ebenaĵoj
Kuras grandaj turoj
Portas ĝi legendojn,
Granda ĉina muro.*

*De antikva tempo
Sonas voĉ' de homoj,
Ke miraklojn kreis
Kun diversaj nomoj.*

*Pasis jam miljaroj,
Fluis preter akvoj
Per rojoj, riveretoj
En marojn, oceanojn.*

*Placo Tian'anmen,
Koro de nacio,
Tie mond' eksciis
Pri Popola Ĉinio.*

*Ĉinaj satelitoj
Aperis en ĉielo.
En unuaj vicoj,
Vi, estas lando bela.*

*Kaj ekonomio
Bone disvolviĝas,
Ĉina jen socio
Al progres' moviĝas.*

*Por esperantistoj
Veran mirindaĵon
Donacis jen Ĉinio
Por diversaj aĝoj.*

*Revuo mirakla
Kiel spegul' de vivo
Bela kaj fabela
Rakontas pri Ĉinio.*

*En la nuna jaro
Legantoj jen laŭ moro
Gratulas jubileulon
De la plena koro.*

*Vivu kaj disfloru,
Helpu al vi Dio!
Revuon ni gloras
“El Popola Ĉinio”.*



Mia Entuziasmo por Esperanto, Mia Fervora Favoro al Ĉinio

de LUDOVIKO ENIZAN (Francio)

MIAJ konatuloj miras pro mia entuziasmo por Esperanto kaj pro mia fervora favoro al Ĉinio. Ĉar ambaŭ iom interplektiĝas, mi devas retroiri kvardek jarojn malantaŭen, ĝis 1947, kiam kolego informis min pri la Internacia Lingvo, kiun mi tuj eklernis.

En 1984, mi ĉeestis Internacian E. Kongreson en Amsterdamo kaj estis infektita de la Z. (Zamenhof) viruso. Oktaga restado kun samspecaj homoj estis troa. En 1950 falis en miajn manojn, mi ne scias kiel, la unuaj numeroj de jam bela revuo "El Popola Ĉinio", kiu inokulis al mi duafoje la Z. viruson. Mi estis definitive infektita.

Ĉu imageblis, ke en tiu fora lando, kiun oni povis en tiu epoko atingi nur post unu monata navigado, estis tiaj homoj, kiajn mi renkontis en Amsterdamo? Ne certe; certe ne; mi revis. Almenaŭ tia estis la opinio de la normalaj homoj.

Sed ĉies opinio estis senefika kaj mi daŭre iradis laŭ la vojo de mi elektita. Iam mi abonis "EPC". La plej malnova ekzemplero en mia kolekto estas la No 6/1953, kies fotokopion de la frontopaĝo mi aldonas.

Neniam plu estos rompo en niaj rilatoj. Eĉ dum la plej gravaj turmentoj la revuo troviĝis akurate, ĉiumonate en mia leterkesto.

Ĉiam, iam kiel nun, ĝojse trafas min, kiam atingas min la lasta numero, kiun mi tuj foliumas por esplori la plej interesajn novaĵojn pri la ĉinaj popolo kaj lando kaj pri la Esperanto-movado enlanda kaj tutmonda. Poste, kiam mi havas tempon, mi finlegas la artikolojn kaj kontemplas la belajn fotojn.

Ĝis 1980 mi restis anonima leganto de la revuo, kaj subite, neatendite, mia foto aperis en supra bildo sur la interno de la kovrilpaĝo de la februara numero. Kia surprizo! Kun la plej alta mano mi salutas la ĉinan ĉefministron elirantan el la urbodomo de Parizo. La bildo-klarigo estas iom erara, ne estas en "Rennes" sed en "Parizo". Kiamaniere mi troviĝis en la fokuso de la fotisto, kaj kial la redakcio de "EPC" elektis tiun foton? Hazarde?

En 1983, mi, iama utopiisto, realigis mian revon kaj surteriĝis en Pekino. Esperantista delegacio atendis nin (Zorka'n kaj min) en la aerodromo. Mi iom miris kaj rimarkigis ke ni estas nur simplaj esperantistoj.

— Jes, sed niaj intimaj geamikoj de pluraj jaroj.

Post dumonata restado en Ĉinio, precipe en Pekino kaj Ŝanhajo, ni rehejmiĝis, kaj tiam komenciĝis individua korespondado. Fine, en 1985, iu anoncis sian viziton al Parizo kaj ĵus alveninte telefonis: "Ĉu ni povas renkontiĝi?" La sekvontajn tagojn ni ofte estis kune. Tuttagan viziton li dediĉis al nia urbo Rueil Malmaison, kiu akceptis lin per bonvenigaj vortoj aperintaj sur la urbaj elektronikaj paneloj. Ni pilgrimis la straton Zamenhof. Ni tagmanĝis kun la esperantistaj sciencistoj en la Instituto Franca de Petro-

lo kaj pli intime vespermanĝis ĉe ni en tute amikeca rondo.

En 1986, denove ni estis en Pekino. Trisemajna instruado en la Lingva Instituto, tritaga Internacia Konferenco de Esperantistaj Sciencistoj, la 71-a U.K. kaj du-semajna ekskurso en Liaoning-provinco duonĉinigiis nin je nia plej granda plezuro.

Pri tiu vojaĝo aperis intervjuo en tutnacia fervoja franca revuo "LA VIVO DE LA RELO". Franclingve "LA VIE DU RAIL".

En 1989 ni gastigis junan paron vojaĝantan al la 74a U.K. Ili eble artikolos pri siaj travivaĵoj en Eŭropo kaj iom pri sia angora restado antaŭ la Opero de Parizo, atendante min, la momente fantoma gastiganto.

Nun "EL POPOLA ĈINIO" pretas festi sian kvardekan jariĝon kaj invitis nin al tiu jubileo. Tenta alvoko. Ne facile rezistebla altiro al la perspektivo revidi tiom simpatiajn kaj gastamajn geamikojn. Tamen saĝon mi devas obei. Kvardek jaroj pasis, kiuj ne havis la saman efikon ĉe mi kiel ĉe "EPC", kiu daŭre pliriĉiĝas, plibeliĝas, havas pli kaj pli belajn kolorojn, pli taŭgajn enhavojn. Tion ĉi mi plej sincere diras kaj nenian kritikon mi volas aldoni, ĉar mi tro timas difekti ion en la revuo, kiu atingis la plej altan renomon en la internacia Esperanto-movado.

Al la tuta redakcio de "EPC" ni prezentas niajn plej korajn gratulojn kaj dankojn. Al la revuo mem ni deziras daŭran prosperon: amplekse, oftece, internaciskale. ■

ZHANG QICHENG*:

Kiel EPC estis lanĉita?



En majo 1990, nia revuo "El Popola Ĉinio" festos sian 40-jaran jubileon. Laŭ Konfuceo, homo 40-jara ne plu ŝanceliĝos, tio signifas, ke li jam posedas firman mondkoncepton kaj stabilan vivsintenon. Rilate al nia revuo, eble oni povas diri, ke estante 40-jara, ĝi jam stariĝis por si firman bazon kaj havas stabilan pozicion en Esperantujo. Do, estas verŝajne interese por niaj legantoj informiĝi, kiel EPC estis lanĉita kaj kiel tio povis okazi nur kelkajn monatojn post la fondiĝo de nia nova popola respubliko.**

Por rakonti pri tio, oni devas retrospektive rigardi la ĉinan Esperanto-movadon kun la bona tradicio, t.e. per praktika laboro servigi Esperanton al la ĉina popolo. En la 30-aj jaroj de

la kuranta jarcento, la plej grava kaj urĝa tasko de la ĉina popolo estis batali kontraŭ la agreso de la japanaj imperiistoj kaj liberigi la nacion. Sekve, la progresemaj kaj patriotaj esperantistoj levis tre aktualan devizon: "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio!" kaj sub tiu devizo estis aperigitaj unue subtera mimeografita PEK-bulteno (Bulteno de Proleta Esperanto-Korespondado) kaj poste publike presita informilo "Ĉinio Hurlas". En la periodo de la rezistmilito, Esperantaj revuoj "Voĉoj el Oriento", "Orienta Kuriero" kaj "Heroldo de Ĉinio" estis eldonitaj respektive en Hankou, Hongkong kaj Chongqing. Materialoj el tiuj bultenoj aŭ revuoj, kiuj montris la terurajn suferojn kaj heroajn batalojn de la ĉina popolo, estis multe utiligitaj de diverslandaj ĵurnaloj aŭ gazetoj kaj akiris por la mizera Ĉinio profundan simpatian kaj fortan apogon mondscale. Tute kompreneble, la efika praktika laboro de ĉinaj esperantistoj rezultigis, ke Esperanto gajnis por si popularecon kaj prestiĝon inter la intelektuloj kaj revoluciaj gvidantoj.

Post la fondiĝo de la popola respubliko, dank' al la favoro de nia registaro, ni havis avantaĝon pli progresigi Esperanto-movadon en nia vasta lando. Kaj antaŭ ĉio ni pensis, ke oni devas heredi nian brilan tradicion kaj aperigi Esperantan revuon por informi la eksterlandanojn pri la diversaj aspektoj de la nova Ĉinio, kies naskiĝo skuis

la tutan mondon. Estis nove fondita en Pekino la Fremdlingva Eldonejo, kies tasko estas eldoni fremdlingvajn revuojn, broŝurojn kaj librojn, kaj mi feliĉe fariĝis unu el ĝiaj redaktoroj. Tutnature venis al mi la ideo, ke Esperanto fariĝu unu el la lingvoj uzotaj de tiu eldonejo kaj ia Esperanta revuo estu eldonota de ĝi. Mi konsiliĝis kun nia estimata pioniro s-ro Hujucz. Li tute aprobis mian ideon kaj afable promesis subteni min por ĝin efektiviĝi. Tiam, inter diversaj ministerioj de la nova registaro, estis ministerio por informado. La ministro de tiu ministerio estis s-ro Hu Qiaomu, kun kiu mi konatiĝis, kiam mi aktivis esperantiste en Ŝanhajo antaŭ la milito. Li havis kontakton kun esperantistoj kaj bone konis la valoron de Esperanta laboro. Li senhezite aprobis mian planon de Esperanto-aplikado kaj diris jene al la respondeculo de nia eldonejo: Pro tio ke ne eblas por ni aperigi eldonaĵojn en multaj lingvoj, precipe en la nefortaj, estas oportune kaj preferinde, ke Esperanto estu aplikata kaj Esperantan revuon aperigu, kaj ĝuste en tiuj landoj de nefortaj lingvoj Esperanto estas vaste konata.

Estis definitive decidita la plano eldoni revuon en Esperanto, kaj mi devis komenci diversajn preparlaborojn. La plej urĝa tasko estis varbi laboran-

tojn por la redakcio. Ja troviĝis en Pekino altnivela esperantisto. Li estis neniu alia ol nia veterana kolego s-ro Venlo Fon. Sed tiam li okupis sin ne kiel esperantisto, sed kiel angla-lingva instruisto en iu fama mezlernejo. Estis ege malfacile transpostenigi lin el la lernejo, ĉar li estis ne nur esperantisto kompetenta kaj sinoferema, sed ankaŭ instruisto honesta kaj laborema, la lernejestro sendube ne volis lin malhavi. Necesis do forta helpo flanke de iu aŭtoritata altrungulo por persvadi la lernejestron. Kaj ĝuste tia aŭtoritatulo ni trovis s-ron Guo Moruo, vaste konatan erudiciulon de nia lando kaj tiaman prezidanton de la Kultur-Eduka Konsilio de la popola registaro. Dum la periodo de la rezistmilito, s-ro Guo estis estro de iu registara buroo, sin okupanta pri kulturaj agadoj. Nia Esperanta revuo "Heroldo de Ĉinio" estis eldonita en la kadro de tiu buroo, kaj li havis bonan impreson pri nia lingvo. Li bonvole donis al ni necesan helpon kaj ni sukcesis varbi s-ron Venlo Fon al nia redakcio. Poste ni engaĝis alian veteranon. Li estis s-ro Honfan, kapabla esperantisto kaj samtempe lerta redaktoro. Post granda klopodo ni solvis la malfacilan problemon de personaro. La aliaj preparlaboroj estis pli-malpli teknikaj kaj relative facile plenumebraj.

Post kelkmonata streĉa laboro, ni estis tute pretaj inaŭguri la revuon, kaj ĝia unua numero aperis en majo 1950 kvazaŭ nova stelo ekbrilanta super la horizonto de Esperantujo. La revuo estis presita sur simpla papero per malgrandaj litertipoj en formato de eta ĵurnalo. Kompare kun sia nuna bela aspekto kun multpaĝaj koloraj bildoj, la revuo je la komenco ja

aspektis tre modesta kaj eĉ mizera. La kialo estis, ke ni ne intencis aperigi imponan periodaĵon, sed anstataŭe nur simplan informilon. Kaj nia ĉefa celo estis liveri interesajn materialojn, por ke ili estu utiligitaj en alilandaj nacilingvaj gazetoj. Tial ni nomis nian periodaĵon informa bulteno kaj donis al ĝi simplan titolon "El Popola Ĉinio"

En la unua numero de nia nova revuo estis artikolo "Almozulo Farigās Distriktestro", kaj tiu interesa rakonto priskribanta la novan socion de nia lando estis tradukita bulgarlingven kaj publikigita en la prestiĝa bulgara ĵurnalo "Laborista Afero". Krom la bulgara, tiu rakonto kaj aliaj materialoj el la unua kaj dua numeroj de nia revuo estis utiligitaj ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj, ekz., la finna, japana kaj slovaka. Estis neesprimebla ĝojo por ni, kiam nia redakcio ricevis koncernen ekzempleron de tiu ĵurnalo senditan de nia bulgara kolego, ĉar tio okulfrape montris la sukceson de nia laboro kaj konvinke pruvis la praktikan utilecon de Esperanto. Laŭ ĉina popoldiro, tio signifas, ke "la unua pafo de nia kanono eksplodis brue", kaj tiu bruo signifis la bonan komencon de la revuo.

EPĈ bone kreskis kaj nun fariĝis unu el la plej ŝatataj revuoj en Esperanto. Ĝi multe kontribuis al nia movado kaj precipe al konstruado de la ponto de kompreniĝo kaj amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj. Por la ĉina esperantistaro kaj por tutmondaj esperantistoj, ĝia 40-jariĝo estas vere festinda, ĉar ni ĉiuj ĝin amas kaj deziras al ĝi plian sukceson kaj progreson. ■

* La aŭtoro estas honora membro de UEA kaj vicprezidanto de ĈEL.

** Nia popola respubliko estis naskita la 1-an de oktobro 1949.

EN tiu ĉi majo plena de sunlumo kaj freŝaj floroj la redakcio de El Popola Ĉinio festos sian 40-jaran jubileon. Kiel la plej juna tradukisto de EPĈ, mi sentas apartan emocion. Je tio leviĝis en mi bela rememoro, kiel mi komencis lerni Esperanton kaj labori en la redakcio, Esperanta verdejo.

Kiam mi estis mezlernejano, mi aŭdis pri Esperanto kaj en mi ekĝermis la volo lerni Esperanton. Tamen pro diversaj kaŭzoj mia volo ne realiĝis. En la vintro de 1984, kiam mi studis en la filozofia fakultato de la Nankina Universitato, mi informiĝis, ke en Pekino okazos en 1986 la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. Se homoj el diversaj lokoj de la mondo kunvenus kaj interparolus libere en la sama lingvo! Ĝuste tiam la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto (ĈKEI) varbis novajn lernantojn, mi kaj mia samklasano anoncis nin al la lernado. Ni lernis nian lingvon ĉefe en postlecionaj horoj kaj letere petis de ĝiaj instruistoj solvi al ni demandojn. Post unu jaro kaj duono finiĝis la elementa kurso kaj mi estis prijuĝita kiel elstara lernanto post ekzameno.

Tiam en la universitato la angla lingvo estis ununura fremda lingvo instruata en deviga kurso por ni, studentoj de nefremdlingva fako. Tamen en la angla lingvo troviĝas sennombraj lingvaĵoj komplikaj kaj neregulaj, tial mi ankoraŭ ne bone posedas ĝin, kvankam mi dediĉis al ĝi multe da tempo kaj energio. Ĉiufoje, kiam ni havis lecionon aŭ ekzamenon de la angla lingvo, mi timis kaj eĉ trovis min ne taŭga por lerni fremdan lingvon. Ke mi sukcesis en memlernado de Esperanto, tio

WANG HANPING:

Al la esperoplenta verdejo

rehavigis al mi fidon pri lingvo-lernado. Mi progresis en lernado de la angla lingvo, kaj plie, mi planis daŭrigi lernadon de Esperanto por posedi ĝin kiel eble plej frue.

Iuvespere de la vintro de 1986, mi kaj tiu mia samklasano, elstara lernanto, bonvenigis instruiston Zou Guoxiang, vicdirektoron de ĈKEI (la nuna vicestro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo), en la hejmo de respondeculo de la Jiangsu-a Esperanto-Asocio. Li veturis al multaj lokoj malgraŭ frosto, vizitis lernantojn de ĈKEI kaj donis premiojn al elstaraj lernantoj. Mi estis informita, ke mi lernos senpage en ĝia progresiga Esperanto-kurso. De tiam mi pli kaj pli interesigis pri Esperanto. La kurso daŭris unu jaron kaj en la sama periodo ankaŭ la Nankina Universitato funkciigis nedevigan Esperanto-kurson. Por pli rapide posedi ĝin mi lernis en la du kursoj.

El leteroj de ĈKEI, mi informigis, ke mankas al EPĈ junaj tradukistoj kaj ĝi deziras diplomitojn el alta lernejo, fervorajn al Esperanta laboro. Kvankam mi ŝatis Esperanton, tamen fakte ĝi ne estis mia ĉefa lernobjekto. Mi dronis en hezitado, ĉu okupiĝi pri filozofio aŭ pri Esperanto. En majo 1988, mi unuafoje venis al Pekino kaj vizitis nian redakcion. Gvidan-

toj de EPĈ varme akceptis min kaj konigis al mi la signifon de Esperanta laboro. Kiam mi vidis, ke ĉiuj laborantoj de EPĈ sin dediĉas kun entuziasmo, mi firme decidis labori por la alta idealo de Esperanto.

Kvankam mi iagrade posedis Esperanton, tamen mi ankoraŭ ne kompetentis por labori en la redakcio. Por kiel eble plej rapide altigi mian Esperantan nivelon, gvidantoj de EPĈ sendis min al la Ŝanhaja Universitato de Fremdlingvaj Studoj. Tie mi lernis en la 8-a Esperanto-kurso por Altlernejaj Instruistoj. En septembro 1988, dek du kursanoj el diversaj lokoj kolektiĝis en ĝi, salutante unu alian en Esperanto, kaj komencis unujaran lernadon.

Ĉiutage, kiam la suno leviĝis, ni komencis legi Esperante. En la tempo por tagmanĝo ni ekzercis nin en Esperanta konversacio. Vespere ni mem lernis en la klasĉambro. Inter ni la plej juna ankoraŭ ne finis lernadon en mezlernejo kaj la plej aĝa havis pli ol 60 jarojn. La diferenco inter aĝoj ne malproksimigis nin kaj la Esperanta idealo nin intimigis kiel familianojn. En ĉiu semajnofino ni okazigis balon de esperantistoj. Dimanĉe ni ekskursis. En naturo ĝoja rido kaj Esperanta voĉo regis super verdaj kampoj.



En la unu jaro ni kontaktiĝis kun multaj esperantistoj. Ni akceptis alilandajn esperantistojn, inter kiuj troviĝis fame konataj Simo Milojević ĝenerala direktoro de la Universala Esperanto-Asocio, kaj Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA. Ilia vizito kuraĝigis nin. Junie de 1989, sinjoro Umeda venis partopreni la ceremonion de la finiĝo de nia lernado kaj donis al ni diplomojn. Vidante nin novajn esperantistojn, li tre ĝojis.


Diplomiginte, mi tuj veturis al la redakcio de EPĈ. En la vivo kaj laboro mi ricevis multe da helpo de la gvidantoj kaj kolegoj. Por koni la medion kaj la laboron mi uzis ĉirkaŭ 3 monatojn, antaŭ ol fari tradukadon. Tiutempe mi vidis nemalmultajn alilandajn amikojn (plejparte niaj legantoj) viziti la redakcion kaj rememori pri pasintajoj kun niaj laborantoj. Mi fieras pro nia afero.

En la pasintaj 40 jaroj la redakcio iris zigzagan vojon. Multaj esperantistoj dediĉis sian energion, por ke nia verdejo fariĝu vivo-plena. Mi, kiel juna esperantisto, devas multe lerni de miaj kolegoj kaj daŭre kultivi la verdejon, por ke EPĈ trovu por si pli kaj pli da legantoj en la venontaj 40 jaroj. Mi kredas, ke niaj amikoj troviĝos ĉie en la mondo. ■

MI KAJ ĈINIO

Mia bildo pri Ĉinio

de KRZYSZTOF ZERO (Pollando)



MI vivas en Pollando tridek jarojn kaj mi povas tute sincere skribi, ke dum la periodo mi ĉiam havas bildon pri Ĉinio. Ĉinio, lando tre malproksima de mia lando, lando granda kaj multnombra, kaj tute alia ol la mia, kvazaŭ apartenus al tute alia mondo. Ĉinio ĉiam estis por mi la lando plena de misteroj, enigmoj, kaj pro tio ĉiam interesa.

La unuaj informoj pri Ĉinio, kiel la unuaj strekoj kreintaj novan bildon, estis por mi tre neklaraj, eĉ sekretaj. En la infanaĝo mi sciis, ke ĉinoj estas flavaj kaj portas rondformajn ĉapelojn. Kun infanca konsidero mi miris, ke ĉinoj manĝas nur rizon kaj trinkas nur teon. Mi grande miris, ke ĉinoj manĝas rizon per du malgrandaj bastonetoj anstataŭ per kulero. Kaj kiam mi unuafoje aŭdis la ĉinan lingvon kaj vidis ĉinlingvan skribaĵon, mi pensis, ke ĉinoj faras ĉion, por ke ilia vivo estu malfacila. Ĉio el Ĉinio estis por mia juna kapo tro stranga por kompreni. Tial mi preferus amuziĝi per ludo nomata “Ĉino”.

Amuziĝante mi eĉ ne rimarkis, kiam pasis la senzorga

tempo kaj mi devis iri al la elementa lernejo. Irante al la lernejo mi jam sciis, ke ĉinoj estas la plej multaj ol ĉiuj aliaj nacioj, kaj ankaŭ ke mi devas paroli klare, ĉar mi aŭdis de mia patro “Parolu klare, ne ĉine”. Jes, por mi polo, Ĉinio signifis ion nekomprenblan, neklaritan. El manko de televidilo sekvis, ke al la neplenaj informoj mia imago aldonis falsajn.

Tiel do, mia bildo post kelkaj jaroj iĝis pli enigma. Iom post iom la bildon mi povis korekti dank’ al la lerneja edukado. Oni skizis al mi la antikvan ĉinan historion, oni sciigis min pri la ĉina kontribuo al la monda tekniko kaj civilizacio. La lecionoj de geografio montris al mi landon tre grandan kaj belan. Bedaŭrinde, en miaj lernejjaroj mankis al mi informoj pri nuntempa vivo en Ĉinio. La informoj, kiujn mi akiradis, estis ne malpli strangaj ol tiuj en la infanaĝo. Mi grande miris, ke ĉiuj ĉinoj estas egale, grize vestitaj, kaj ke preskaŭ ĉiuj biciklas.

La informoj estis misteraj, tiel misteraj, kvazaŭ ili devenus de iu fabelo anstataŭ de reala vivo. Pro sia mistera karaktero Ĉinio iĝis por mi pli kaj pli alloga lando. Mi ofte rigardis mian desegnatitan bildon — sur kiu es-

tis flava homo kun rondforma ĉapelo, la granda muro, rizo manĝata per malgrandaj bastonetoj, ĉina filozofio kaj antaŭa tekniko, skribaĵoj en la malfacilega lingvo, teo, bicikloj, amaso de egale grize vestitaj homoj... kaj nombro — 1 000 000 000. La strekoj de mia bildo estis plue senordaj, nereguligitaj kaj iuj el ili estis tute false desegnitaj. Kaj en la tuta bildo dominis unu koloro — malgaja griza koloro. Mian imagon pri Ĉinio plenumis griza koloro, kaj fermita pordego de Ĉinio ne permesis aŭdi de la lando gajan kanton. Tre malfeliĉa devas esti vivo en Ĉinio, mi pensis, se ĉiuj biciklas en granda interpremo, ĉiuj havas la grizajn vestojn... Kaj krom tio, ili malfaciligas sian vivon uzante tre malfacilan lingvon.

Nenio do miriga. Kiam mi la unuan fojon rimarkis ĉe mia amiko la revuon titolitan “El Popola Ĉinio”, mi estis surprizita, ke ĝi devenas de Ĉinio. Mi longe ne povis kompreni, ke Ĉinio povas esti tia buntkolora lando, en kiu vivas gajaj homoj. La nova informo denove mirigis min. Bedaŭrinde, tiutempe mi ankoraŭ ne scipovis legi Esperante, pro tio mi povis nur trarigardi

tiun ĉi belegan revuon. Mi rigardis, rigardis kaj prenis la kolorojn por mia propra bildo. Poste, kvazaŭ spite al mia antaŭa imago pri Ĉinio, en mia lando ekaperis belegaj ĉinaj produktaĵoj, por mi tre belegaj pro siaj vivaj belegaj koloroj. Mi povis rigardi la kolorojn, kiujn mi tiel longe bezonis por mia bildo pri Ĉinio. Mia bildo desegnita, pentrita de la komenco de mia vivo nun estis preskaŭ entute plenumita de diversaj, mirindaj koloroj, kaj el ĝi sonis ĉarmaj ĉinaj muziko kaj kanto. Ĉio estis por mi tiel interesa, ke mi ekdeziris kompreni la ĉinan vivon, la ĉinan animon, rigardi pli multe da bildoj pri tiu ĉi lando.

La ĉina lingvo estas tro malfacila, por ke mi povu lerni ĝin. Mi komencis lerni Esperanton, la lingvon, kiun uzadis mia amiko kaj kiu konvinkis min, ke Esperanto estas ŝlosilo al la tuta mondo. Li stimulis min al la lernado rakontante pri siaj ĉinaj geamikoj. Li helpis al mi pentradi mian propran bildon pri Ĉinio, bildon nefinitan, kiu estas rimarkebla nur de mi, la bildon de mia imago.

Hodiaŭ mi jam scipovas legi la revuon "El Popola Ĉinio". Mi ankaŭ havas geamikojn en tiu ĉi lando. Ili ĉiuj pligrandigas mian bildon, en kiu oni povas trovi muzikon kaj teknikon, ĉiutagan vivon en Ĉinio, sporton, ekonomion, historion, medicinon, vivmanieron de ĉina familio, morojn kaj politikon. Mi trovas en la revuo fragmenton de la ĉina animo.

MI KAJ ĈINIO

Leciono

de **RAYMOND WYLLEMAN** (Belgio)

EN oktobro 1986 mia edzino kaj mi partoprenis trisemajnan vojaĝon en Ĉinio kiel membroj de malgranda grupo de ok personoj, organizita de la Belga-Ĉina Amikeca Asocio en Bruselo. Ĉar fakte nia vojaĝo fariĝis kadre de ĝemeligo inter la ĉina provinco Hunan kaj la belga provinco Hainaut, ni restis dum unu semajno en Hunan-provinco, parte en la ĉefurbo Changsha kaj parte en montara regiono. Survoje al Suoxi-valo ni tranoktis en Changde.

Post la vespermanĝo ni faris



promeneton tra la ĉefstrato de la loĝkvartalo, kie troviĝas nia hotelo. Estis varma vespero kaj lante malheliĝis. La kvieto de la ĉirkaŭaĵo nepre estis bonvena post laciginta tago en la aŭtobuseto, sub varmega suno, preter polvaj vojoj. Malgraŭ la tute fremda ĉirkaŭaĵo ni eksentis afablan an-

Tridek jarojn mi faras mian bildon kaj mi estas certa, ke mi finos ĝin neniam. Ĉinio estas tro granda lando, tro varia kaj ĝi tro diferencas de la mia, por ke mi povu scii ĉion pri ĝi. Ĉinio, lando tre malproksima de mi, dank' al Esperanto, iras al mi portante siajn valorojn.

Ne eblas rakonti pri Ĉinio dum unu horo, tago, jaro... Tamen eblas kompreni la agadon de "El Popola Ĉinio" legante frag-

menton de la letero de mia amiko. "Mi estas dankema al la redakcio de 'El Popola Ĉinio'", skribis hungaro vivanta en Rumanio, "ke ĝi ebligis al mi aliĝi al E-movado, legi bonajn E-legaĵojn, ke ĝi estis kun mi dum longaj jaroj..."

Ne eblas rakonti ĉion pri Ĉinio, sed ankaŭ ne eblas pli rapide koni Ĉinion sen "El Popola Ĉinio". ■

imstaton. Estis unu el la maloftaj momentoj, en kiuj grupanoj sin sentas tre proksimaj unu al alia.

Subite neordinaraj sonoj aŭdiĝis. Ni nin rigardis nekredante. Okcidenta blovmuziko en ĉi tiu malproksima ĉina urbo...? Eble gramofonmuziko...? Ni scivoleme direktis nin al la sonoj. La sereneca etoso de antaŭe abrupte rompiĝis. En branĉostrato ni vidis grupon da homoj antaŭ lumigita domo. Ni miksiĝis inter la ĉirkaŭstarantoj kaj vidis orkestron de kvin muzikistoj, kiuj gaje blovis siajn instrumentojn. Super ili pendis veltolo kaj antaŭ la fasado de la domo sur drato pendis ĉiusecaj objektoj, kiel mantukoj, litkovriloj, litotukoj kaj aliaj mastrumiloj, ĉiu ankoraŭ dece enpakita. Ni do ĉeestis feston!?

Nia ĉeesto rimarkiĝis kaj tuj ni estis en la centro de scivolemaj rigardoj. Ŝajnis, ke okcidentaj turistoj tie estis ankoraŭ ege raraj. La vorto "amerikanoj" (almenaŭ tion ni supozis kompreni) flustre transdoniĝis, kaj, kiam la fanfaristoj ankaŭ rimarkis nin, ili ĉesigis sian ludon kaj tuj ekludis vivecan vakeran melodion. "O Suzana!..." Tri junuloj venis al ni. Post kora salutado en la angla kaj niaj klarigoj pri nia deveno, ili faris inviteman geston en la direkto de la domo. Per kelkaj francaj kaj anglaj vortoj ni tamen dankis ilin, klarigante, ke ni estis tro lacaj kaj devis enlitigi sufiĉe frue, ĉar la venontan tagon ni daŭrigos nian vojaĝon al Suoxi-valo. Niaj klarigoj ŝajne kompreniĝis, sed la

fakto, ke ni estas belgoj, el Belgio, Belgique, Belgium, laŭ ni eble ne estis tute klara. Estis vera leciono de humileco por ni, kiuj en nia landeto seninterrompe ekscitiĝas pri lingvaj 'problemoj' kaj ilia politika solvo. Kiel gravaj ni nin sentas hejme! Kaj ĉi tie, en Ĉinio, ni konstatis, ke nur "Paris" (Parizo) estas konata en nia parto de Eŭropo kaj tiel ankaŭ ni estas konsiderataj homoj apartenantaj al Francio. Ni adiaŭis la junulojn kaj reiris al la hotelo. Survoje ni preparolis nian renkonton, ĉar ni miris pri la okazintaĵo. Unue pri la okcidenteca fanfarista muziko en la ĉina interna lando. (Poste mi legis artikolon pri tiu temo en EPC). Krome ni havis demandojn pri la naturo de la festo. Pro la aĵoj pendigitaj antaŭ la domo ni konkludis ke ni ĉeestis edziĝfeston. Cetere, grupano aldonis, ke li rimarkis paron, kiu portis blankan rubandon ĉirkaŭ la brako. Tiu lasta rimarko decidis la aferon.

La sekvantan matenon ni rakontis nian travivaĵon al sinjorino Song, nia ĉiĉeronino. Kiam ŝi aŭdis pri la blankaj rubandoj, ŝi diris: "Vi ĉeestis funebran feston." "Kun ĉiuj tiuj donacoj kaj gaja muziko?" "Jes, tio certe kernis grandaĝan personon. Por la ĉinoj morto post longdaŭra vivo signifas 'blanka feliĉo'. Geedziĝo kaj naskiĝo estas 'ruĝa feliĉo'." "Kaj la donacoj?" "Budhismaj ĉinoj kredas je renaskiĝo, mortinto nur forvojaĝas. Por tio oni antaŭe metis donacojn apud la senvivan restaĵon. Tiu ĉi kutimo evoluis kaj nuntempe la pli realismaj ĉinoj destinas la donacojn al la parencoj de mortinto. Tiuj ĉi pli bone uzos ilin ol la lasta..." ■



La aŭtoro en Zamenhofa festo en Pekino

EN decembro pasintjara mi finfine sukcesis realigi malnovan revon, nome, mi povis viziti Pekinon, kaj antaŭ ĉio la redakcion de EPC, kies leganto mi estas ekde ĝia unua numero. Sur miaj librobretoj hejme troviĝas bindita 39-jara kompleto de tiu gravega revuo (ĉar ne eblis bindigi la 40-an ĝis la fino de 1990!). Kian panoramon tiu kolekto prezentas! Kaj kiel gravegan kontribuon la revuo faris kaj daŭre faras al la prospero kaj la evoluo de nia afero!

Evidente la unua kaj ĉefa celo de tiu ĉi publikaĵo estis liveri informojn pri la vivo kaj kulturo de Ĉinio, kaj dum jaroj de ĉina izoliteco — precipe dum la jaroj 1966-76 — nur al tio ĝi dediĉis sin. Dum tiu periodo temis ankaŭ, kompreneble, pri eksterlanda militado, kaj, kiel ĉiam kaj ĉie dum militoj, propagandado pri la propra praveco superis ĉiujn aliajn konsiderojn.

Efektive, tiel indigniĝis pri tio sincera samlandano mia, ke li eĉ proponis bojkoti en nia lando la revuon! Mi tamen defendis ĝin, dirante, ke la ĉina registaro rekonas la gravecon kaj utilecon de nia lingvo, kaj mi sopiras la tagon, kiam nia registaro sekvos tiun bonan ekzemplon. Ĉiuokaze, la propono malsukcesis.

MI KAJ ĈINIO

Retrospektive al la 40 jaroj de EPĈ

de WILLIAM AULD (Britio)

En ĉiuj aliaj jardekoj, la enhavo de la revuo estis multe pli diversa kaj interesa, kaj ofte — precipe dum la lastaj dek jaroj — plivastiĝis por inkluzivi internaciajn kaj propre esperantistajn informojn. Kunlaboron ankaŭ de eksterlandaj samideanoj oni varbis kaj vartis.

En la unuaj jaroj, 1950-51, la revuo estis grandformata, kiel ĵurnalo. Mi bone memoras, kiel alloge efikis al mi tiam (kaj daŭre nun) la interesaj artikoloj, kaj tute aparte la multaj belegaj lignogravuraĵoj, kiuj ilustris multajn tekstojn. La stilo de tiuj lignogravuraĵoj estis influita de la tradicia ĉina arto de papertranĉado, da kiu aperis ankaŭ belaj ekzemploj. (En julio 1953 fakte aperis artikolo klariganta pri "Moderna Ĉina Lignogravuro").

Eble mi klarigu ke mia unua eksterlanda E-korespondanto, kiam mi elpaŝis en la movadon, estis ĝuste ĉino, kiu skribis al mi longajn tre interesajn leterojn. Temis pri k-do Eltunko, kies leteroj tro baldaŭ ĉesis. Nur post du tri jaroj mi sukcesis sciigi, ke li estis murdita. Granda perdo, ne nur al mi.

Nu, en la jaroj 1952-53, la formato de EPĈ ŝanĝiĝis, kaj ĝi eliris en formo de kultura revuo, kun kolora kovrilo kaj kun enhavo parte ankaŭ literatura, do miafaka. Sed en la numero de decembro 1953 aperis konsterna kaj neatendita informo: "...nia redakcio decidis ĉesigi la eldonadon de El Popola Ĉinio, kaj tiu ĉi estas ĝia lasta numero." Mi estis malĝo-

jigita, kaj denove perdis kontakton kun tiu malproksima kaj por mi interesa lando.

Sed feliĉe montriĝis ankoraŭfoje, ke Esperanto estas nedetruenda. En 1957, jen agrabla surprizo — aperis provnumero de nova EPĈ. Oni anoncis: "Ekde la printempo de 1956, la verda stelo finfine rebrilas en nia vasta lando, kaj la Ĉina Esp-Ligo paŝo post paŝo refunkciigis." Inter 1958 kaj 1966, EPĈ aperis sesfoje jare, kun varia enhavo kaj mondaj kontaktoj.

Sekvis, kiel mi jam diris, dek jaroj pli politikaj, kvankam ekde ĉ. 1974 komencis reaperi artikoloj pli ĝeneralaj, kaj la politikaj polemikaĵoj eldoniĝis kiel apartaj kajeroj kunsenditaj. Depost 1978, certe sub influo de pli liberaj vojaĝkondiĉoj en kaj eksterlande, la enhavo, kiel jam notite, pli kaj pli internaciigis. Tio kvaŝaŭ kulminis en la 71-a UK, kiu tre sukcese okazis en Pekino. La revuo jam akiris al si amason da geamikoj tra la mondo, kio evidentiĝas fizike ĉe la amase partoprenitaj EPĈ-kunvenoj en la diversaj UK-oj.

Ĉe tiuj samaj UK-oj mi havis okazon renkontiĝi kun ĉinaj esperantistoj kaj amikiĝi kun pluraj el ili. Sekve mia edzino kaj mi decidis viziti Pekinon, kaj la bonvenigo far la lokaj esperantistoj ĝojigis niajn korojn. (Ni scias, ke multaj aliaj eksterlandanoj spertis similon!) Inter senombraj feliĉaĵoj, aparte gravaj por mi estis niaj renkontiĝoj kun la stabanoj de EPĈ mem.

Interne de la kovrilo de 1/1990 vi trovis foton de tiuj stabanoj, inter kiuj ni kalkulas amikojn novajn kaj


malnovajn. Vidu kiel multnombraj ili estas! Starigi al mi la demando: ĉu tio ne devas esti la plej granda grupo de kunlaborantaj profesiaj esperantistoj en la tuta mondo? Mi estas certa, ke jes. Kaj inter ili oni tuj rimarkas la sinceran zamenhofan spiriton — la profesieco tute ne detruis aŭ eĉ sordinis la esperantisman idealon. Ilia vivo ne ĉiam estis facila, sed troviĝi inter ili estis sperto inspira kaj samtempe kortuŝa.

Mi ankaŭ tre admiras ilian laboron. Multaj el ili laboras kiel tradukistoj ("tradukuloj" tro modeste asertis unu el ili), kaj estas malfacile tro taksii la valoron de tio, kion ili faras. Pensu, ke multajn horojn en ĉiu tago ili pasigas tradukante en Esperanton tekstojn pri la plej diversaj fakoj, kaj pro ĉiu esprimo uzita en la originalo ili devas trovi — senprokraste — la trafan ekvivalenton. Eble nur alia tradukisto kapablas ĝuste taksii la malfacilaĵojn kaj ĝuste admiri la glatecon de iliaj solvoj.


Preskaŭ hazarde mi havis okazon foliumi ekzempleron de la plurvolumaj fakterminaroj, kiujn pretigis por ilia uzado Akademiano Xie Yuming, kaj mi povas diri, ke ties kompleteco kaj precizeco mirigis min. Mi ege bedaŭras, ke tiuj kleraj listoj ne estas pli ĝenerale koneblaj.

Ĉar mi asertas, ke la praktika neceso solvi problemojn en aktualaj kunteksto valoras por la lingvo multege pli, ol jaroj da teoriumado en kabinetoj. Kaj pro tio la pli ol 20000 paĝoj de EPĈ estas lingve studendaj, precipe kiam temas pri fakterminaraj esploroj. La kompetenteco de la ĉinaj profesiuloj estas unuanivela. Eble ili mem estas tro modestaj pri siaj atingoj.

Nia vizito al Pekino estas unu el niaj plej memorindaj travivaĵoj. Kaj tio ŝuldiĝas al la gastameco kaj sincera amikeco de niaj ĉinaj samideanoj. ■





En la regadejo de la Wuhan-a Ferŝtala Kompanio Foto de JIN YE



DA WEI:

Fera fluidaĵo Foto de JIN YE




En la laminato de la Anshan-a Ferŝtala Kompanio Foto de JIN YE




De 158 000 al 60 000 000 tunoj da ŝtalo

Ekipaĵo importita de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio

Foto de JIN YE





Altfornoj de la Taiyuan-a Ferŝtala Kompanio

EN la fino de 1989 la ŝtala produktokvanto de Ĉinio atingis 60 000 000 tunojn.

En la ĉina metalurgia laborkunveno, okazigita komence de 1990, mi intervjuis respondeculojn de iuj ferŝtalaj entreprenoj kaj ekvicestron de la Metalurgia Ministerio Ma Chengde. Ili kun profunda emocio diris al mi, ke la ferŝtala industrio de la nova Ĉinio kreskis kun la respubliko kaj iris zigzagan kaj esperigan vojon

LEVIĜO SUR RUINO

Antaŭ 40 jaroj la duonfeŭda kaj duonkolonia Ĉinio forlasis kadukan ferŝtalan industrion kun jara produktokvanto de 158 000 tunoj da ŝtalo. Sur la areo kun longo de 5 km de la Anshan-a Ferŝtala Fabriko, la tiama ferŝtala bazloko, ne vidiĝis komplete maŝino. Alilandanoj antaŭdiris: “Tiu terpeco estas destinita nur por kreskigi sorgon.”

La registaro de la nova Ĉinio donis apartan atenton al la ferŝtala industrio kaj decidis restarigi produktadon en tri jaroj. Dank’ al la subteno de la popolamasoj kaj ĉiuj aliaj flankoj, post du jaroj la menciita fabriko denove ekfunkciis. Samtempe, dekelkaj ferŝtalaj fabrikoj, kiaj tiuj de Benxi, Fushun, Dalian, Pekino, Tianjin, Tangshan, Ŝanhajo k.a., restarigis sian produktadon. En 1952 la jara ŝtala produktokvanto atingis 1 350 000 tunojn kaj multe superis la plej altan rekordon de la malnova Ĉinio tiurilate.

Ĉefdirektoro de la Anshan-a Ferŝtala Kompanio Li Huazhong konigis al mi, ke en la periodo por restarigi la nacian ekonomion la Anshan-a Ferŝtala Fabriko praktikis provizan sistemon kaj ne salajris laboristojn. Ĝi donis nur 1.5 kg da senŝeligitaj sorggrajnoj al la laboristo ĉiutage. Sub tiu malfacila kondiĉo, por prosperigi la ferŝtalan industrion de la nova Ĉinio, laboristoj kun granda energio, en malpli ol du jaroj post la ekfunkciigo de la fabriko, produktis milionon da tunoj da ŝtalo jare kaj per tio kreis la plej altan rekordon en la historio. Nun, la jaraj

produktokvantoj de fero kaj ŝtalo de la kompanio atingis 7 kaj 8 milionojn da tunoj respektive. Ĝi ne nur fariĝis enlande ununura ferŝtala kombinato, sed ankaŭ enviciĝis inter la dekelkaj grandaj ferŝtalaj kompanioj de la mondo.


DU LEVIĜOJ KAJ DU MALLEVIĜOJ

La periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) de la ĉina nacia ekonomio estis ora sezono por disvolvi la ferŝtalan industrion de la nova Ĉinio. Rigardante ferŝtalon kiel bazon de la nacia ekonomio, la ŝtato komencis grandskalan bazan konstruadon kun entreprenado de altforno 7, granda ŝtallaminejo kaj fabriko de senjuntaj ŝtaltuboj sub la Anshan-a Ferŝtala Fabriko kiel ekirpunkto. La fabriko de specialaj ŝtaloj de Qiqihar en nordorienta sovaĝejo kaj la ŝtala fabriko Bayi en nordokcidenta Ĉinio finkonstruiĝis kaj ekfunkciis, kaj poste komenciĝis la konstruado de la Wuhan-a Ferŝtala Fabriko en centra Ĉinio kaj la Baotou-a Ferŝtala Fabriko en norda Ĉinio. En la 5 jaroj la ŝtala produktokvanto kreskis per 31.7% ĉiujare kaj atingis 5 350 000 tunojn en 1957.

En 1958 Ĉinio faris eraran paŝon kun alvoko “la tuta popolo ŝtaligu”, kio serioze malhelpis la disvolviĝon de la ĉina ferŝtala industrio.

Ma Chengde rememoris la pasintecon: Responde al la alvoko pri la granda impeto de la ferŝtala industrio, baldaŭ aperis en diversaj lokoj de la lando miloj kaj dekmiloj da malgrandaj altfornoj kaj koaksofornoj, eĉ urbanoj kolektis eluzitajn feraĵojn kaj ilin fandis. Rezulte, la produktokvantoj kaj kvalitoj de fero kaj ŝtalo ne estis garantiataj, kaj cetere, pro malŝparo de multaj laborfortoj kaj materialoj en ŝtaligado, dronis en malordo la nacia ekonomio kaj ĉesis labori grandaj ferŝtalaj entreprenoj, kun perdo netaksebla.

En 1963 nia registaro decidis korekti la eraron kaj prenis serion da reordigaj rimedoj, kiel simpligi la administran strukturon, ellabori atingeblajn nor-



Ferminejo administrata de Ĉinio kaj Aŭstralio



Zhao Chengshun

mojn de industria produktado kaj elimini la malgrandajn altfornojn kaj koaksofornojn. En la postaj jaroj, sin apogante sur siaj propraj fortoj, Ĉinio konstruis la Radringan Fabrikon sub la Maanshan-a Ferŝtala Kompanio, kio finis la historion, ke oni muntis vagonojn kun importitaj radoj kaj ringoj. Krome ĝi konstruis ankaŭ grandan ferŝtalan kombinaton en la regiono Panzhuhua, Sichuan-provinco. Samtempe ĝi pligrandigis iujn fandajn kaj minekspluatajn entreprenojn kaj tiujn produktantajn akcesorajn materialojn, kaj tiel formiĝis rimarkinda bazo de la ferŝtala industrio.

Kiam la ĉina ferŝtala industrio stabile disvolviĝis, komenciĝis la "kultura revolucio". La 10-jara ĥaoso pli serioze malhelpis la disvolviĝon de la ĉina ferŝtala industrio. Je mencio pri la du leviĝoj kaj du malleviĝoj de la ferŝtala industrio, li diris al mi, ke en la pasintaj 40 jaroj estis tri faktoroj decidantaj la sorton de la ĉina ferŝtala industrio, nome, politika situacio, ekonomia leĝo kaj dispozicio interne de ferŝtala industrio. Se la tri faktoroj estas normalaj, do la ĉina ferŝtala industrio disvolviĝas; se iu el ili estas nenormala, do aperas al ĝi stagno kaj malleviĝo. La malvenko de la "granda impeto" kaŭziĝis de malobservo de la ekonomia leĝo, t.e., troa rapideco ofte kondukas al malvenko; la malleviĝo okazinta en la "kultura revolucio" estis kaŭzita de nestabila politika situacio. La eksvicestro, kiu laboris dekojn da jaroj sur la ferŝtala fronto, diris, ke la ĉina ferŝtala industrio, metinte bazon por si en la antaŭaj 30 jaroj, finfine ekleviĝis en la postaj dek jaroj.

10-JARA IMPETO

De 1979 Ĉinio praktikis reforman kaj pordomalferman politikon. La ferŝtalaj entreprenoj, sekvante la principon ekspluati latentajn fortojn, reformi, kompletigi kaj pligrandigi sin, plifortigas administradon, akcelas teknikan progreson kaj prenas serion da reformaj rimedoj. Dank' al utiligado de kapitaloj, riĉfontoj kaj merkatoj en- kaj eksterlandaj, la ferŝtala industrio suriras vojon de sana disvolviĝo.

En la lastaj jaroj, la ferŝtalaj entreprenoj konstante reordigis sian dispozicion. Oni prenis rimedojn subteni la grandajn kaj mezgrandajn entreprenojn kaj limigi la malgrandajn metalurgiajn entreprenojn, kiuj konsumas multan energion kaj havas malaltan efikon. Tio ege plialtigis la aktivecon de lokoj kaj entreprenoj. Nun en la tuta lando funkcias 15 grandaj, 58 mezgrandaj kaj pli ol 1000 malgrandaj ferŝtalaj entreprenoj.

En la komenca periodo post sia fondiĝo, la nova Ĉinio povis ŝtaliĝi nur ĉ. 100 specojn kaj produkti ŝtallaminataĵojn kun ĉ. 400 normoj. Nun ĝi jam povas ŝtaliĝi pli ol 1000 specojn kaj produkti ŝtallaminataĵojn kun 20000 normoj, kaj havas serion de ŝtalalojo. Kaj ankaŭ evidente altiĝis la produktokvalito. En 1989 Ĉinio produktis 17 000 000 tunojn da ŝtallaminataĵoj laŭ la postulo de internaciaj normoj, kiuj konsistigis 35% de la totala produktokvanto de ŝtallaminataĵoj.

En la dek jaroj la ferŝtalaj entreprenoj importis pli ol 1000 avangardajn ekipaĵojn kaj teknikajn atingojn el evoluantaj landoj. La unuaperioda konstruo de la Baoshan-a Ĝenerala Ferŝtala Fabriko de Ŝanhajo estis ekipita tute per eksterlandaj avangardaj teknikoj. Ankaŭ multaj malnovaj entreprenoj suriris novan vojon de memreformado, sin apogante sur teknika progreso. La Anshan-a Ferŝtala Kompanio kun historio de pli ol 70 jaroj plenumis pli ol 30 gravajn konstruojn pri teknologioj kaj ekipaĵoj, kaj efektiviĝis serio da gravaj impetoj.

Ĝuste en la dek jaroj Ĉinio plenumis impeton de 30 000 000 al 60 000 000 tunoj da ŝtalo, rezulte de tio la nova Ĉinio okupas la kvaran lokon per ŝtala produktokvanto en la mondo, sed ĝi okupis nur la 29-an lokon en la komenco post la fondiĝo tiurilate.

CENTJARA SONGO

De 1890, kiam naskiĝis la unua ĉina moderna ferŝtala fabriko, jam pasis jarcento. Kvankam la malnova Ĉinio produktis sume 7 600 000 tunojn da



Ŝtaligistoj · Foto de LIU WENMIN



Ce Martin-fornejo · Ĉefurba Ferŝtala Kompanio · Foto de LIU WENMIN


ŝtalo en 60 jaroj, tamen la sonĝo fariĝi ferŝtala potenco la ĉina nacio jam strebis cent jarojn.

La 40-jaraj meritoj de la ferŝtala industrio de la nova Ĉinio realigis la sonĝon. Oni povas diri, ke la 60 000 000 tunoj da ŝtalo estas rezulto de la saĝo kaj penema laboro de la 3 000 000 ferŝtalistoj. En la Anshan-a Ferŝtala Kompanio laboras unubrakulo Zhao Chengshun, kiu ricevis diplomejn pri fakoj matematika kaj komputika, dank' al sia diligenta lernado. Poste, li kun siaj kolegoj faris 128 teknikajn renovigojn.

En 1989 plenumiĝis la tasko de 60 000 000 tunoj

da ŝtalo kaj la ferŝtala industrio alfrontis la malfacilan situacion de manko de karbo, elektro, trafikiloj kaj kapitalo, maloftan post la fondiĝo de la respubliko. Tamen la laboristoj kaj oficistoj sur la ferŝtala fronto ĉiamaniere venkis la malfacilojn, organizis produktadon, rompis la rutinon de malalta produktokvanto en varmaj julio kaj aŭgusto kaj kreis sinsekve la plej altan nivelon en la samâ periodo de la historio. Post septembro ili kreis plurfoje la meznombran tagan produktokvanton de pli ol 180 000 tunoj da ŝtalo.

La 60 000 000 tunoj da ŝtalo ne signifas la finiĝon de la centjara sonĝo, sed ĝian novan startpunkton. ■



Glaciaj pagodo, drako kaj tigro

Denove en neĝa vintro

Teksto de HU YUN
Fotoj de LIU SIGONG

Kristala mondo



EN neĝa vintro norda Ĉinio fariĝis blanka kaj ĉarma. En unu nokto arbobranĉoj ĉe Songhua-rivero pleniĝis de glaciaj pendaĵoj. Same kiel printempo-anoncaj floroj ili vigligis la urbon Harbin en frosta vintro kaj levis la kurtenon de la Neĝa Festivalo de Harbin, kiu okazas unu fojon ĉiujare.

VINTRA FESTO

Harbin situas en la meza mezvarma zono. Tie la kvar sezonoj estas klare distingeblaj kaj vintro longa kaj frosta, tial oni nomas Harbin "Glacia Urbo". En frosta vintro oni enverŝis akvon en lavpelson aŭ sitelon. Kiam la akvo glaciĝis, oni prenis la glacian ŝelon, elverŝis la akvon kaj starigis kandelon en la ŝelo. Tio ja estas la plej frua glacia lanterno. Laŭdire, glacia lanterno estis uzata de fiŝisto ĉe Heilong-rivero kiel lumilo. Poste ankaŭ urbanoj faris glacian lanternon. Iom post iom ĝi fariĝis vintra amuzilo de Harbinanoj. Historia libro priskribas: "Meze de la unua monato oni lumigis en la urbo lanternojn por kvin noktoj. Vilaĝaj virinoj venis por ĝui teatraĵon kaj knarado de ĉaroj daŭris

tra la noktoj. La 2-metra glacia lanterno 'Longviva Maljunulo' kun paro da brulantaj kandeloj similas al kristala homo." Oni povas vidi, ke la popola arto, kvankam ne eleganta, pliigis vivetoson por Harbinanoj en frosta vintro.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, glacia lanterno disvolviĝis kiel unu el la popolaj artoj kaj amuziloj. En la pasintaj 40 jaroj Harbin 16-foje okazigis glaci-lanternan ekspozicion en parko. Kaj formiĝis la neĝa festivalo unika en Harbin. La ĉi-jara 6-a Neĝa Festivalo estas pli grandioza ol tiuj de la pasintaj jaroj. Ĝi disvolviĝis el simpla montrado de glaciaj lanternoj en aktivadon kun glaciaj arto, sporto, kulturo, komerco, scienco kaj tekniko. Apenaŭ vintriĝis, Harbinanoj sin ekokupis pri preparado de la neĝa festivalo. Multaj alilokanoj kaj alilandanoj venis al Harbin pro ĝia famo, kaj Harbin tuj ekbolis.

KRISTALA MONDO

Noktiĝis. Enirinte en Zhaolin-parkon, mi vidis kristalan palacon, kiun mi imagis en la infaneco. Alta arkado en antikva stilo, saltanta arta ĉevalo, zigzaga koridoro kaj

glaciaj konstruoj ornamitaj per koloraj lampoj kaj modernaj laserradioj pompe briligis la kristalan palacon kaj konfuzis la rigardon.

La koridoro, konsistanta el du vicoj da glaciaj lanternoj en formo de lotusfloroj, kondukis min al la vintra vidindejo de Yinhu-lago. En la mezo de la vidindejo estas malgranda artefarita lago ĉirkaŭita de glacia koridoro. Sur glacia bedo en la lago prosperas glaciaj lotusfloroj. Trans eŭropstila glacia ponto staras glacia domo kun duklina tegmento. Sur flankaj muro de la domo estas vent-rado. Kiam ĝi turniĝas, ĝiaj ruĝaj padeloj kaj blanka glacia domo forte kontrastas, kaj plie la korto estas ĉirkaŭita de altaj kaj malaltaj, dikaj kaj maldikaj bariloj. Tio prezentas hispanan idilian ĝenron de la 17-a jarcento.

Mi promenis en la glacialantera maro kaj transiris ponteton kaj montodeklivon, subite granda konstruaĵo aperis antaŭ miaj okuloj. Ĝi ja estas Tengwang-pavilono konstruita imite laŭ unu el la kvar famaj ĉinaj pavilonoj. Ĝi okupas areon de 400 kvadrataj metroj kaj altas je 20 metroj, kun 3 000 kubmetroj da glacio. Kvankam ĝi ne estas tiom alta kaj granda, kiom la vera, tamen ĝiaj suprenlevitaj tegment-randoj, elegantaj korbelloj kaj multkoloraj lamplumoj pliigis ĝian pompecon. Starante antaŭ la pavilono, mi laŭdis la eminentan arton de la lertaj farintoj. Poste mi vizitis Zhu Xianqi, projektinton de la glacia Tengwang-pavilono. De li mi sciis, ke por fari glaciajn lanternojn oni uzis naturan glacion de Songhua-rivero. Antaŭ 20 tagoj laboristoj komencis preni glacion sur la rivero. Malgraŭ frosta vento, ili laboradis sur la rivero kaj iliaj gantoj kaj vestoj ofte glaciĝis. Ili elfosis glaciajn blokojn, portis ilin sur bordon, segis ilin en brikojn kaj glatigis ilin, poste faris diversformajn glaciajn lanternojn same kiel konstrui domon. Zhu diris ankaŭ, ke la ĉi-foja festivalo kreis 15 vidindejojn, eksponis pli ol 1 000 glaciajn verkojn kaj por tio uzis

En sledo sur glacio



preskaŭ 20 000 kubmetrojn da glacio.

EMINENTA ARTO DE GLACI-SKULPTURO

Internacia glaci-skulptura konkurso estis atentokapta aktivado en la festivalo. 9 grupoj el 5 landoj partoprenis la konkurson. La konkurso iris tre streĉe. La konkurstantoj estis tre seriozaj. Geedzoj Evans el Kanado skulptis sovaĝan anseron kaj cignon. Ili diris, ke sovaĝa ansero simbolas forton en Kanado kaj cigno Heilongjiang-provincon. Per modelo de flugantaj sovaĝa ansero kaj cigno ili esprimis deziron pri longa amikeco inter la ĉina kaj kanada popoloj.

La grupo de Sapporo de Japanio elektis pacon kiel temon. Ili skulptis pli ol 40 diversajn vivoverajn kolombojn kun plumoj klare videblaj kaj brilantaj en la sunlumo. El tio oni povas vidi la eminentan arton de la kreintoj.

Post dutaga konkurso la verko "Reveno al la Hejmloko" de la grupo de Asahikawa de Japanio gajnis la ĉampionecon. La skulptaĵo montras, kiel salmo revenas al la hejmloko, spertante danĝerojn. En la skulptaĵo la saltanta salmo, vivovera nigra urso, proksimaj arboj kaj malproksimaj montoj estas tre admirindaj.

En la festivalo okazis ankaŭ konkursoj de glacia kaj neĝa skulptado. En ĉiu konkurso partoprenis kelkdek ĝis cent personoj. La konkurstantoj estis malsam-profesiuloj. Iliaj verkoj estas jad- aŭ ŝtonsimilaj. Por ili farado de glacia lanterno estas ne nur simpla amuzo, sed ankaŭ supera arta aktivado.

AMUZEJO SUR GLACIO

Sur la glacia Songhua-rivero troviĝas tre ideala amuzejo. Tuj kiam mi eniris en ĝin, granda glacia monto prezentiĝis antaŭ miaj okuloj. Ĝi aspektas kiel karsta stalaktito. Malgranda trajno traveturis




La glaci-skulptaĵo Tengwang-pavilono

tunelon sub la monto kaj infanoj en la trajno ĝoje ridadis. Kompare kun la malgranda trajno, ĉevalsledo ŝajne havas pli da gusto de norda Ĉinio. La sledo estas tegmentita per desegnita teksaĵo, kiu, de malproksime vidata, montriĝas ruĝa kaj verda. Sur la kolo de la ĉevalo pendas sonorilo, kiu sonoras, kiam la ĉevalo iras sur la rivero. Se oni malkontentas pri la malrapida sledo, oni povas veturi per raŭpo-motorveturilo, kiu veturas tre rapide. Sporta sledo estas pli interesa ol motorveturilo. Homoj tri- aŭ kvin-ope sidantaj en sledo glitas malsupren de sur 45-grada deklivo kaj laŭ 300-metra

glitejo kaj post momento atingas la finon. Kompreneble, se ili ne bone orientas la sledon, ili deflankiĝas kune kun la sledo. Eĉ se la sledo renversiĝas, ili ne vundiĝas.

La plej altira aktivado en la amuzejo estas naĝo. En la temperaturo de 20°C sub la nulo oni saltis en la frostan riveron por naĝi, kio estas neimagebla por multaj. Tamen en Harbin kelkcent personoj partoprenas vintran naĝadon. Inter ili troviĝas laboristoj, lernantoj, oficistoj, kuracistoj kaj inĝenieroj, ĉu junaj ĉu maljunaj.

La ortangula naĝbaseno estas sur Songhua-rivero. Ĉiutage ma-




Bela glaci-skulptaĵo

tene kaj tagmeze iuj venas tien por naĝi. Mi vidis ilin tiel senĝenaj, kvazaŭ ili naĝus ne en la temperaturo de dekkelkaj gradoj sub la nulo. Knabino en ruĝa naĝvesto diris al mi, ke ŝi, laboristino, estas sana kaj ne timas malvarmon. Inĝeniero laboranta en esplora instituto diris, ke antaŭe li suferis multe da malsanoj, sed post kiam li naĝadis vintre, li resaniĝis. Junulo Feng diris, ke ne estas vero, ke oni ne sentas malvarmon naĝante en tiel frosta tago, tamen oni sentas plezuron kaj ekscitiĝon, se oni persistas. Kvar personoj venintaj el Taiwan saltis en la akvon unu post alia. Ili diris, ke ili naĝas vintre en Taiwan, sed la temperaturo estas multe pli alta ol tiu en Harbin. Tamen, kiel ajn ili diris, ĉirkaŭ la naĝbaseno la rigardantoj en dikaj vestoj ankoraŭ tremis. Kaj oni povas diri, ke naĝo en vintro estas amuzo nur de kuraĝuloj. ■



Velado sur glacio


Glaci-skulptado




Lernado de skiado



En glaci-amuzejo



Geedzoj Evans faras glaci-skulptaĵon.



ESP-NOVAĴOJ

● Antaŭ nelonge la Shandong-a E-Asocio starigis sian medicinistan societon en la urbeto Zaozhuang, Shandong-provinco. Ding Fangming, vicprezidanto de la Shandong-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco, ĉestis la fondan kunvenon. Wang Yongti, profesoro de la Shandong-a Medicina Universitato estis elektita kiel prezidanto de la societo. La medicinista societo eldonos periodaĵon "Medicino de Shandong".

● Magistra grupo de la dua angla lingvistika kaj literatura klaso de la anglalingva fakultato de la Orientĉinia Normala Universitato funkciigis unujaran E-kurson, 4 horojn semajne. La kurson gvidas vicprofesoro Cao Donghai.

● Laŭ la peto de esperantisto Song Zibin, s-ro Chen Zude, vicprezidanto de la Internacia Go-Ligo kaj prezidanto de la Ĉina Goista Asocio, surskribis "Disvastigu Esperanton por feliĉigi la homaron" sur Esperanta memorkoverta, esprimante sian inklinon al Esperanto. S-ro Chen tre subtenas disvastigon de Esperanto intergoistoj. Li tuj konsentis, kiam Song Zibin transdiris al li, ke la registaro kaj la Sporta Komitato de Bengbu, Anhui-provinco, volas or-

ganizi en Bengbu internacian esperantistan go-konkurson. Song kaj Chen interŝanĝis opiniojn pri starigo de la Esperantista Go-Ligo Ĉina.

● Luo Zhijun, ĉefa aktorino de la Jiannanchun-a Ĉigong-akrobata Ensemblo de Sichuan-provinco, eklernis Esperanton en 1983. Por disvastigi la praktikan kampon de Esperanto, tiu ĉi ensemblo deziras kontakti kun Esperantaj organizoj kaj fari kulturajn interŝanĝojn per Esperanto.

● Dum 1989 en la ŝtata sovetia revuo "Popola Kreado" oni publikigis 12 lecionojn de Esperanto. Aŭtoroj de la bonkvalita kaj bonstila instrumaterialo estas Natalija Ŝoroĥova kaj Andreo V. Orlov, prezidanto de la Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj, kiu estas sola E-organizo en USSR, posedanta rajton de jura personeco kaj havanta kontojn en bankoj. Ĉiu numero de la revuo enhavas kelkajn malgrandajn flekseblajn disketojn. 4 el ili oni produktis en Esperanto.

● La plenumkomitato de Fondaĵo Ivo Lapenna decidis starigi Stipendion Ivo Lapenna. La stipendio estos atribuita ĉiun jaron aŭ ĉiun duan jaron al la aŭtoro de la plej bona scienca tezo (disertacio) sur la kampo de interlingvistiko kun rilato al Esperanto, akceptita oficiale en universitato aŭ samran-



Luo Zhijun en ĉigong-prezentado

ga alta lernejo. Detala regularo estos ellaborita baldaŭ.


● Inter la 1-5-a de junio 1990 okazos en Blois la 82-a Franca Kongreso de Esperanto. Estos aranĝitaj riĉaj kulturaj programoj kaj pluraj altnivelaj prelegoj en Esperanto, i.a. prelegos Gregoire Maertens, estrarano de UEA. Eksterlandanoj estas bonvenaj kaj bonŝancaj por viziti la belegan kastelon de Blois. Adreso: UFE (KONGRESA SERVO) 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris, Francujo.

● Klubon "ESPERANTO" en la Nica liceo "Massena" kreis junaj membroj de la Nica Esperanto-Grupo en Francio.

La Nica E-Grupo ĉiusemajne gvidas duhoran Esperantan kurson al teatra junula grupo, kiu deziras lerni Esperanton, kaj organizas Internacian Esperanto-Semajnon, kiu okazos en Nico de la 29-a de junio ĝis la 6-a de julio 1990. Por aliĝo kaj informoj skribu: GROUPE ESPERANTISTE DE NICE. Les Hortensias 2. 121 bis Boulevard Napoleon III. F-O6200 NICE Francujo.

La loka radio elsendas ankaŭ 50-minutan programon pri Esperanto.

Memorkoverta por la 71-a UK kun surskribo de Chen Zude



Pri la poemo “Matene, adiaŭo al Lin Zifang ĉe Jingci-templo”


de WANG JILIN

*La Okcidenta Lag' aspektas en monat' julia
ja diference en belec' ol en sezon' alia:
lotusfolioj verdas vaste ĝis la ĉielrando
kaj lotusfloroj ruĝas tre en brilo sunradia.*

Yang Wanli (1127-1206), la aŭtoro de la poemo, estis unu el la kvar famaj poetoj de la Suda Song-dinastio. Li majstris en poemo pri naturaj pejzaĝoj. “Matene, adiaŭo al Lin Zifang ĉe Jingci-templo” estas unu el liaj stilaj poemoj. Lin Zifang estis amiko de la aŭtoro. La poemo estis lia improvizaĵo en mateno, kiam li eliris kun amiko Lin el Jingci-templo antaŭ adiaŭo. La templo situas ĉe la fama pitoreska Okcidenta Lago en Hangzhou. Priskribante nur lotusajn florojn kaj foliojn, la poeto sukcese prezentis la pitoreskan Okcidentan Lagon.

Xu Liming ĝuigas nin per siaj kaligrafaĵo kaj pentraĵo verkitaj laŭ la temo de la poemo. S-ro Xu naskiĝis en 1954. Li estas promesplena pentristo, kaligrafo kaj sigelilo-ĉizisto. Li diplomiĝis el la Nankina Arta Instituto en 1982 kaj sukcese trapasis la ekzamenon por esti esplor-studento de la pentra fakultato de la instituto en la sama jaro. En 1985 li akiris la titolon de magistro kaj poste instruis en la instituto. Tiu lia kaligrafaĵo elspiras fortecon kaj naturecon, kaj plene esprimas la estetikan formon kaj spiriton originalajn de la ĉina kaligrafio.

Ankaŭ tiu lia pentraĵo estas distingiĝa. Li prenis lotusajn foliojn kaj florojn sub la suno sia objekto: la fonon de sennombraj verdaj lotusaj folioj kaj ruĝaj floroj kontrastas granda malhelverda folio, unu floro en plena disvolviĝo kaj alia en butono. La folioj kaj floroj frontaj kaj fonaj estas bone dislokitaj kaj hele kolorigitaj. La pentraĵo donas impreson pri vasta horizonto, kvieteco kaj viveco. La aŭtoro perfekte enkorpigis la spiriton en la poemo de Yang Wanli kaj bone esprimis la belecon de ĉina pentrarto. ■



Kaligrafaĵo de XU LIMING



Pentrajo farita de Xu Liming por la poemo

楊萬里詩意
一
利
富



Moderna Agrikulturo en Ĝermado

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de WU XINHUA

EN la Delto de Perlo-rivero mi propraokule vidis, ke tie ekĝermis moderna agrikulturo longe aspirata de la ĉinaj kamparanoj. Tio estas kvalita ŝanĝiĝo en la disvolviĝo de sciencoj kaj tekniko de agrikulturo akcelita de la kampara reformo kaj pordmalferma politiko praktikataj en la lastaj jaroj.

MORUSKAMPO KAJ FIŜLAGETO

Komence de novembro jam estas malvarme en Pekino, sed en Shunde-gubernio de suda Ĉinio prosperas morusarboj kaj bananarboj. Tie brilas fiŝlagetoj, kiel speguloj, bonorde inkrustitaj sur la


ebenaĵo. Kia ĉarma loko!

Mia akompananto Lin diris, ke dum longtempa produktado la tieaj loĝantoj kreis la sciencan kultivan sistemon "moruskampo kaj fiŝlageto". En la ĉirkaŭaĵo de fiŝlageto oni plantas morusarbojn, per ĝiaj folioj nutras silkraŭpojn, per la ekskremento de silkraŭpoj kaj dispecigitaj morusfolioj nutras fiŝojn. La ekskremento de fiŝoj kaj organikaĵoj en la ŝlimo funde de lago estas uzataj kiel bonaj grasumoj por la morusarboj kaj grenplantoj. Mi informiĝis, ke antaŭ kelkaj jaroj la ĝenerala sekretario de la Internacia Geografia Unio kaj vicdirektoro de la Internacia Universitato de Unesko vizitis la gubernion. Li opiniis, ke la 45 000 hektaroj da moruskampoj kaj fiŝ-

lagetoj de la gubernio formiĝis en raran medion de ekologia ekvilibro.

Historie Shunde estis ĉefa produkto de bredataj fiŝoj de Ĉinio. En 1989 la hektara produktokvanto de tiaj fiŝoj estis je 3 600 kg pli alta ol tiu de Guangdong-provinco, kaj je 6 000 kg pli ol tiu de la tuta lando. Ĉiutage la gubernio liveras al Hongkong ĉ. 40 000 kg da vivaj fiŝoj, je duono pli multe ol la kvanto de la dolĉakvaj fiŝoj vendataj en la merkato de Hongkong. De la pasintaj jaroj la produktokvanto de la breditaj fiŝoj en la gubernio pli kaj pli kreskas. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke la specialigitaj fiŝbredistoj aplikas novajn teknikojn de scienca bredado, kiel doni miksitajn nutraĵojn, injekti vakcinon al fiŝoj kaj uzi oksigenoplimultigilon, tiel ke multe plialtiĝis produktokvanto de la fiŝoj. Krome, la kompanioj de ekstera komerco kaj manĝaĵoj, provizvendaj kooperativoj kaj agrikulturaj servejoj faras ĉion eblan por faciligi la vendadon de fiŝoj kaj stabiligi la prezaron.

Bonrasaj banan-plantidoj kultivatataj en fabriko



TRANOKTO EN FLOR-URBETO

Mia vojaĝo okazis pli ol unu monaton antaŭ la tradicia Pintempa Festo de Ĉinio kaj al mi ne prosperis vidi la spektaklon de la printemp-anonca florfoiro sur loko longa je 7.5 km, kiu okazas unufoje ĉiujare en la fama flor-urbeto Chencun de la Delto de Perlo-

rivero. En la unua vespero post mia alveno, sub la brila luno mi ĝuis en ĝardeno apud roĝo graciajn envazajn orkideojn, oranĝarbojn kun multaj fruktoj kaj ankaŭ diversajn miniaturajn envazajn pejzaĝojn. Ĉe tio mi ne povis ne admiri la mirindan lertecon de la flor-kultivistoj.

S-ro Zeng, direktoro de la Kompanio pri Kulturado de Dekoraciaj Plantoj, diris al mi, ke jam antaŭ 2 000 jaroj oni komencis kulturi florojn kaj oranĝarbojn tie. De la pasintaj jaroj rapide disvolviĝas la tiea kulturado de floroj. Nun en la urbeto laboras 8 000 florkultivistoj, kiuj prizorgas 400 hektarojn da flor-kampoj. Ili enkondukis pli ol 1 200 speciojn de fajnaj floroj en kaj eksterlandaj kaj la jara enspezo de flor-kulturado estas 23 milionoj da juanoj. Riĉiĝinte, ili konstruis loĝdomojn tri- aŭ kvar-etaĝajn, kies balkonoj kaj vestibloj ornamigas per envazaj floroj. Ĉiujare la tieaj floroj vendiĝas ne nur en enlandaj grandaj urboj de Ĉinio, en Hongkong kaj Aomen, sed ankaŭ en Usono, Francio, Nederlando, Japanio, FR Germanio kaj sudorienta Azio.

Kulturado de floroj prosperigas industrion. Ĝia disvolviĝo kreskigas industrion kaj agrikulturon de la urbeto. En la lasta jaro la totala produktovalorado de la tieaj industrio kaj agrikulturo atingis 450 milionojn da juanoj, 9-oble pli ol tiu de 1978. Fine de 1989 la tieaj loĝantoj deponis en la bankoj sume 140 milionojn da juanoj, 47-oble pli ol tiu de la sama periodo de 1978.

NOVA VOJO DE AGRIKULTURO

Dank' al la disvolviĝo de var ekonomio kaj la favora situo de la Delto de Perlo-rivero, la tieaj kamparanoj en la praktiko malfermis novan vojon al la agrikultura modernigo, t.e. "vojo kun moderneco ĉe ambaŭ ekstretoj kaj indiĝeneco en la mezo", alivorte, enkonduki novajn speciojn kaj teknikojn en-

kaj eksterlandajn, konstrui bazojn de produktado kaj eksperimentado, surbaze de tio partoprenigi milojn kaj dekmilojn da familioj en la ĉirkaŭaĵo en sociala sistemo de speciala produktado, produkti grandan nombron da altkvalitaj agrikulturaĵoj, kiuj estos prilaborataj en la bazoj por fariĝi bonvenaj internacie.

Lastatempe la fiŝoj, kia herbovora karmo, ne estas bonvenaj sur internacia merkato. La Zhongshan-a Kompanio de Akvo-produktaĵa Importo kaj Eksporto konigas teknikon por bredi fajnajn fiŝojn al fiŝbredistaj familioj kaj liveras bonrasajn fiŝidojn kaj fajnajn nutraĵojn al ili. Laŭkontrakte la fiŝbredistoj devas akurate vendi al ĝi akvo-produktaĵojn. Per importitaj avangardaj ekipaĵoj ĝi faras fiŝkukojn kaj fiŝbulojn por eksporti. Nun la breditaj fiŝoj de la urbo Zhongshan vendiĝas en Eŭropo kaj Ameriko.

Mandarinoj de Xinhui, fiŝoj de Shunde, fruktoj kaj legomoj de Dongguan, kortobirdoj kaj brutoj de Bao'an kaj Nanhai estas produktataj kaj prilaborataj en la sama maniero, kiel fiŝoj en Zhongshan.

La nova vojo ŝanĝas la konsiston de la tieaj tradiciaj agrikulturaĵoj kaj iliajn specojn. Tie oni laboras por la bonkvalito, moderneco kaj dezirata prezo de siaj produktaĵoj. En ordinara legomĝardeno oni kulturas bonkvalitajn legomojn por luksaj hoteloj kaj restoracioj kaj bredas en lagoj angilojn, testudojn, perkojn, silurojn kaj salikokojn (*Palaemon longines crevette*). Tie grandkvante produktiĝas ankaŭ Taiwan-aj frankolinoj, usonaj reĝ-kolomboj kaj perlo-kokoj kaj prosperas bonrasaj oranĝarboj, bananarboj kaj rizo.

NOVTIPA KAMPARANO

En la lastaj 10 jaroj, samkiel kamparanoj en aliaj kompare riĉaj regionoj de Ĉinio, tiuj en la delto unuj post aliaj liberigis sin de terkulturado kaj ekokupiĝis pri vila-



Bredataj testudoj


ĝaj industrioj. La lertaj terkulturistoj luis ilian teron. En 1984, kamparano Chen Zu de la urbo Dongguan laŭkontrakte ekkultivis 12 hektarojn da tero. Li faris plejparton de la 12 hektaroj riz-kulturejo. Ĉiujare, la neta profito de rizo kulturita de li estas pli ol 10 000 juanoj. La grenoj, produktitaj de Chen kaj liaj tri helpantoj jare, sufiĉas por vivteni 300 homojn.

Oni nomas la familion, kia tiu de Chen, familia farmejo. Nun en la urbo estas 19 000 tiaj familioj. La jara produktokvanto de liĉioj, oranĝoj, longanoj kaj bananoj atingas 250 milionojn da kilogramoj. Se oni transportos ĉiujn tiujn fruktojn al la urbo Kantono kun 3 milionoj da loĝantoj, do meznombre ĉiu ĝia loĝanto havos 90 kg. da fruktoj.

En Dongguan, Nanhai, Shunde, Zhongshan kaj Xinhui, kies produktokvantoj de grenaj kaj ekonomiaj plantoj estas altaj, mi vidis, ke tie preskaŭ ĉiuj vilaĝoj uzas elektron por irigaciado. Oni diris, ke nun ili povas aĉeti agrikulturan maŝinon koston je kelkcent, kelk-



Antaŭ rikolto



Flor-flegado




Vilaĝo kaj kampoj



mil kaj eĉ dek mil juanoj. Riĉaj familioj, kia tiu de Chen, plejparte aĉetis man-traktorojn, elektrajn disgrajnigilojn, pumpilojn kaj instalas kablojn por irigaciado kaj drenado. Iuj el ili havas ankaŭ kombajnjon. 80% de la kampoj estas plugataj per maŝinoj. En Nanhai, Shunde kaj Dongguan la meznombra jara valoro kreita de ĉiu laborulo superas 7 000 juanojn kaj tiu de familia kultivanto, kiu okupiĝas pri produktado elektrizita kaj permaŝina, atingas ĉ. 20 000 juanojn kaj povas rivali kun lokaj industriaj entreprenistoj tiurilate.

Novtipa kamparano estas kaj produktanto kaj entreprenanto. Ilia produktado intensiva, porkomerca kaj speciala estas atentoaltira kaj prezentos la perspektivon de la vasta kamparo en la Delto de Perlo-rivero. ■




Tomatoj produktiĝas tutjare.



Fiŝlageto ĉe banan-plantejo





Kia bongusta batato!

EN Pekino, kiam venas vintro, bakujoj de batatoj aperas ĉe stratetoj unu post alia. La aromo de bakita batato altiras pasantojn. Ĝi, kiel sezona manĝaĵo en Pekino, ne estas notita en historiaj libroj, nek aperas en solena festeno, tamen ĝi estas ĉiam ŝatata.

Estas specoj de batatoj kun ruĝa kaj blanka pulpoj. La ruĝpulpas estas pli dolĉa, dum la blankpulpas pli ameloplana, kun gusto simila al tiu de kaŝtano. En la antikva Ĉinio oni jam kulturis dioskoreojn, tamen la batato estis enkondukita de elmigrantaj ĉinoj el la insularo de la Sudorienta Azio. Tre granda estas la produktokvanto de batatoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino kaj la lokanoj vaporumas, kuiras aŭ bakas ilin por manĝi. Batatoj estis la ĉefa manĝaĵo de la malriĉaj kamparanoj en la montregiono, kiu ne taŭgas por kreskigi grenajn plantojn. Antaŭe, plejparto de la aĉetantoj de bakita batato estis malriĉuloj, kiuj sin vivtenis de penlaboro. Kontraŭ malmulte da mono ili povis aĉeti tian bataton kaj sin satigi, dum la infanoj de riĉuloj neniam prenis tian manĝaĵon.

Bakitaj Batatoj de Pekino

de LING YOUJUAN

Kun la disvolviĝo de agrikultura produktado, tre malmultaj estas la kamparanoj, kiuj prenas bataton kiel sian ĉefan manĝaĵon. Nun la kosto de batato dekoble kreskas kaj bakitaj batatoj estas frandaĵo por la pekinanoj, kiuj prenas rizajn kaj farunajn kiel siajn ĉefajn manĝaĵojn.

Antaŭe, nemultaj estis batatobakujoj en la malnova Pekino. Tiam plejparto el ili estis ĉe la domoj de vendantoj. La bakujoj estis faritaj el brikoj kaj argilo. Ili estis grandvolumenaj kaj nemoveblaj. De la lastaj jaroj la vendantoj uzas anstataŭe eluzitajn oletamburojn kiel bakujojn, kies malsupra parto kun pordo estas uzata por teni karbon, kaj kies supra parto kun ferkrado ene — por teni batatojn. Tiuj bakujoj, ĝenerale, estas

metitaj sur tricikloj aŭ bicikloj por porti ilin de loko al loko. Vendantoj diris, ke ĉiutage ili povas vendi pli ol 40 kilogramojn da bakitaj batatoj.

Je la unua vido estas neimageble, ke en la ventro de la barelo estas apetitivekaj batatoj molaj, varmaj, aromaj kaj dolĉaj. Preskaŭ en duonjaro ili plaĉas al viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj. En frosta vintro, kiam vi ĝuas ĵus bakitan bataton, vi certe sentas dolĉon kaj varmon. Por ĝui la varmon oni ne devas porti ĝin hejmen. Por ĝui la aromon oni devas ĝin manĝi tuj post aĉeto, ne konsiderante, ĉu tio konvenas aŭ ne. Ĉie en Pekino oni povas trovi, ke multaj gejunuloj kun plezuro frandas tian manĝaĵon. ■

Ĉe bakujoj de batatoj



Turniĝanta lanterno

Teksto de GUO BONAN

Fotoj de LING YOUJUAN

TURNIĜANTA lanterno estas amuza lanterno kun bildoj. Simplaj bildoj prezentas nur bestojn kaj homfigurojn postkurantajn kaj kompleksaj — rakontojn. Antaŭ 300 jaroj ĉinaj metiartistoj metis turniĝantan lanternon en kameron kun rigardtruo por allogi infanojn sur strato, simile al primitiva filmo.

Pri la deveno de turniĝanta lanterno iuj diris, ke ĝi estis kreita de anglo en 1836. Tamen antaŭ tio la persa poeto Omar Khayyam (1040-1123) priskribis la homan vivon kiel turniĝantan lanternon en sia fama filozofia poemo. Li skribis: "Mi levis la okulojn por rigardi la vastan ĉielon, imagis ĝin kiel grandan turniĝantan lanternon, la sunon kiel flamon de kandelo, la mondon kiel lanternon kaj nin kiel bildojn." Iu persa doktoro montris en la libro "Pri Khayyam": "Tia lanterno devenis de Ĉinio, antaŭ Khayyam." En la libro li skribis ankaŭ ĉinajn ideografiaĵojn "turniĝanta lanterno" kaj ilian latinigitan transskribon por konstati la fakton.

Ĉar Khayyam mortis en 1123, oni povas diri, ke almenaŭ en la Norda Song-dinastio (960-1126) Ĉin-

io havis turniĝantan lanternon kaj oni enkondukis ĝin en Persion.


Turniĝanta lanterno havas du karakterizaĵojn: uzi varman aerfluan kiel movforton kaj uzi rotacian aranĝaĵon por turni la bildojn. Ĝiaj du karakterizaĵoj atestas, ke antaŭ la Norda Song-dinastio ĝi evoluis almenaŭ 1 300 jarojn. En antikva libro oni skribis, ke en Qin-dinastio en palaco de Xianyang troviĝis lanterno alta je 2.5 m en formo de drako, kies buŝo tenas ĝian lumilon. Kiam ĝi estas lumigita, moviĝas ĉiuj skvamoj de la drako. Ĝi ja estas lanterno kun aerfluo kiel forto por movi la skvamojn de la drako. Ĝi aperis en 206 a.K.

Alia libro notis, ke imperiestro Xuanzong de Tang-dinastio (712-756 sur trono) okazigis bankedon, kun multaj lanternoj kiel ornamo. Inter tiuj la lanterno "Ardeo Turnas Floron" ja estas prototipo de la turniĝanta lanterno "Ardeo Turniĝas".

La sekreto de turniĝanta lanterno estas tio, ke la supra parto de ĝia centra akso portas helicon, kiun oni nomas ombrelo. La aranĝaĵo similas al papera vent-rado, ludilo de infanoj. Kiam oni bruligas kan-



Montrado de turniĝanta lanterno en kesto antaŭ 200 jaroj



Skemo de turniĝanta lanterno



En tradicia lanterna festivalo



Turniĝanta lanterno en festivalo



En farado de turniĝanta lanterno

delon sub ĝi, varma aero leviĝas supren kaj movas la helicon. Kun ĝi kiel movforto, la bildoj turniĝas ĉirkaŭ la akso.

Turniĝanta lanterno bone utiligas varman aerfluan. Sciencistoj kaj teknikistoj rigardas ĝin kiel prototipon de la nuna vapor-turbino.

En Ĉinio troviĝas Kongming-lanterno. Ĝi estas fratino de turniĝanta lanterno.

Kongming-lanterno uzas varman aerfluan ne por movi helicon, sed por levi sin mem. Ĝi havas globforman framon faritan el bambuaj strioj, sen aperturo en la supra parto, kaj tegitan per papero

por malebligi tralason de aero. Sub la lanterno oni bruligas rezinon aŭ meĉon, ke la lanterno plena de varma aero povas leviĝi. En la Kvin Dinastioj (907-960) ne ekzistis lumraketo, tial oni uzis tian rezinan lanternon kiel signalon en batalo. Kiu kreis ĝin? Tio estas nekonstatebla. Oni atribuis ĝin al la ĉina saĝulo Zhuge Liang (181-234). Lia alia nomo estas Kongming, tial la lanterno ricevis la nomon.

Kongming-lanterno kaj turniĝanta lanterno tre plaĉas al la ĉina popolo. Ĉiujare en la Lanterna Festo en printempo la popolo faras multe da tiaj lanternoj por nokta iluminado kaj aldono de vivetoso. ■

LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (12)

Yibin, la pordo de Sichuan kaj Yunnan

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN



Avino kaj nepino

VETURINTE de Chengdu suden kaj trairinte ŝipe Leshan kaj Qianwei laŭ Minjiang-rivero, oni atingas Yibin, gravan urbon de suda Sichuan. Tie la riveroj Minjiang kaj Jinsha kun-

Antikva vidindaĵo



fluas kun Yangzi-rivero torentanta orienten, kaj la akvovojo finiĝas ĉe Wuchidao, kiu etendiĝas suden inter krutaj montaroj kaj kanjonoj.

MALNOVA LOKO DE BO-OJ

Jam en 182 a. K., oni konstruis en Yibin la urbeton nomatan "Bo Dao". Inter la loknomoj de Han-dinastio (206 a.K.- 220 p.K.) la ideogramo "dao" ĝenerale signifis loĝlokon de nacimalplimultanoj. Bo-oj estis la plej fruaj loĝantoj de Yibin kaj plej frue malfermis antikvan vojon. Bo-oj estis laŭdataj kiel "la plej bonkoraj". Legendo diras, ke la loko, kie ili plej frue loĝis, estis veprejo frekventata de rabobestoj. Ili ekspluatis sovaĝejon kaj konstruis sian hejmolandon. En Yibin facilas rivera trafiko kaj etendiĝas antikva vojo al sudo konstruita de bo-oj, sekve de longe ili estis influataj de la vivmaniero kaj moroj de la centraj ebenaĵoj kaj sudaj nacimalplimultoj, kaj samtempe, konservis la siajn. La lokanoj portis kapveston el blanka silko fajna kaj delikata, bluverdan kostumon kaj jupon kun buntaj brodaĵoj. La viroj kun du glavoj

kaj pafarko surkorpe aspektis majesta.

La sepultado far bo-oj estis enigma. Mortinta bo-o estis metita en ĉerkon el malmola tuta ligno. Poste oni pendigis ĝin sur alta krutaĵo. La bo-oj opiniis, ke tiamaniere la mortinto povas enspiri utilan materion de la suno kaj luno kaj lia animo povas leviĝi alten al la ĉielo. Tio estas nomata "ĉerkopendiga sepulto". Kiel oni pendigis tian ĉerkon sur krutaĵo? Pri tio "geologia ŝanĝiĝo" kaj aliaj konjektoj ne estas konvinkaj. La "pendigitaj ĉerkoj" jam fariĝis eterna enigmo de Ĉinio kaj miraklo en la historio de la monda kulturo. Lastatempe ĉinaj kaj usonaj sciencistoj pri antikvaj pendigitaj ĉerkoj elfaris, laŭ notoj de historia verko, lignan vinĉon, ŝnurojn kaj direktajn puliojn, per kiuj ili metis "ĉerkon" 150 kg pezan en groton je pli ol 20 m super akvosurfaco, kaj tiel reaperis spektaklo de ĉerkopendigo okazinta antaŭ 2 000 jaroj. Dank' al tio solviĝis la enigmo de tia sepultado.

Do, kies prapatroj estas la bo-oj? Iuj opinias, ke la bo-oj, kiuj trans-


loĝis en Dali de Yunnan, fariĝis la hodiaŭaj baj-oj; aliaj opinias, ke ili fariĝis gelaŭ-oj kaj ljaŭ-oj. La diroj ankoraŭ ne kondukas al konkludo. La nacia deveno kaj evoluo de bo-oj dronis en la longa historio kaj fariĝis enigmo. Tamen, sendube, Yibin estis malnova loko, kie bo-oj vivis kaj faris ekspluaton kaj kreadon.


Bo-oj lertis en kulturado de liĉiujoj. En Han-dinastio iuj familioj kulturis ĉ. dekmil liĉiujojn. En fiŝista vilaĝo 15 km sude de la urbo Yibin ni vidis kvin antikvajjn liĉiujojn plantitajn de bo-oj. Post ekspertizo oni konstatis, ke ili estis plantitaj antaŭ Tang-dinastio (618-907). Du el ili kreskas apud la granda roko ĉe rivereto de la vilaĝo kaj estas nomataj geamantoj, la aliaj tri plenaj de folioj kreskas inter domoj de la vilaĝo. Iu maljuna kamparano diris al ni, ke la liĉiujoj ne donis fruktojn en la lastaj jaroj. Hortikulturisto faris injektadon al ili, sed vane.

Verdaj liĉioj, produktitaj antikve en Yibin, estis karnodikaj, dolĉaj kaj sukoriĉaj. Ili servis kiel tributo al kortego. Laŭ legendo, kromedzino de la imperiestro de Tang-dinastio Yang Yuhuan tre ŝatis manĝi liĉiojn, kaj la imperiestro Xuanzong ordonis konstrui vojon de la ĉefurbo Chang'an al la liĉi-produktejo de suda Sichuan, por faciligi al ĉevaloj transporti liĉiojn.

ANTIKVA KOMERCA URBO

De antikvece Yibin estas ponto por enkonduki kulturon kaj avangardajn produktajn teknikojn de la centraj ebenaĵoj en sudokcidentajn landlimajn regionojn, kaj komerca centro de la provincoj Sichuan, Yunnan kaj Guizhou. Jam en la periodoj de Qin- kaj Han-dinastioj (221 a.K.-220 p.K.) komercistoj el Bashu kaj la centraj ebenaĵoj venis de Yibin al "Dian-regno" (la nuna Yunnan) por fari negocon. Vendante avangardajn produktilojn de la centraj ebenaĵoj, ili aĉetis por malalta prezo grandan nombron





Strateto en la antikva urbo



Miljaraj liĉiarboj

da sklavoj kaj brutoj de “Dian-regno”. Kiel merkato de sklavoj, Yibin gajnis fameton. Siatempe oni nomis la tie kolektiĝintajn sklavojn “botong-oj”. En la 50-aj jaroj de la kuranta jarcento oni projektis ankaŭ la fervojon de Neijiang al Kunming laŭ la vojo Wuchidao, interkruciĝa punkto de Yibin kaj Zhaotong. Yibin estas grava stacio sur tiu linio.

Albordiĝinte, ni rimarkis urbomurojn de Ming-dinastio (1368-1644) pli ol 20 m altajn. Sur la muroj kreskas grandaj arboj kun volvobranĉoj kaj profundaj radikoj. En murkavo 2 m super la tersurfaco vidiĝis algluitaj ruĝaj ŝtofoj kaj brulantaj olelampoj. Tie lokanoj kultas siajn prapatrojn aŭ deziras bonvojaĝon al siaj parencoj.

Enirinte laŭ la urbon, ni rimarkis tipajn kortojn tuj ĉe la muro. La kortoj estas mizere malvastaj, ke rigardante supren en la korto, oni kvazaŭ sidas sur putofundo. En Zouma-strato ni trovis Yunnan-gilddomon. En la malnova Ĉinio gildo estis starigita de samprovincanoj, samgubernianoj aŭ sammetiuloj en diversaj komercaj urboj. Ĉambroj de la gildo estis destinitaj por samprovincanoj kaj sammetiuloj, kiuj kolektiĝis kaj traktis tie negocon. La grandioza kaj luksa Yunnan-gilddomo, konstruaĵo de

Qing-dinastio (1644-1911), estis la plej granda kaj plej bona en la sudokcidenta Ĉinio. En la gildejo estis halo, flankaj haloj, scenejo, librotenejo, liĉia ĝardeno, salono, pavilono kaj kiosko, kun levitaj tegmentrandoj, ŝtongravuraĵoj kaj lignogravuraĵoj. La tuta dispozicio estas racia. Oni diris, ke siatempe venis komerci multaj homoj, kaj en la gilddomo regis spektaklo. Estas bedaŭrinde, ke estas detruitaj la tieaj lignogravuraĵoj kaj ŝtongravuraĵoj kaj plejparto de la antikvaj konstruaĵoj.

Sur iu movoplana strato la kunlabora komerca centro de Zhaotong en Yibin plioftigas kontaktojn inter ambaŭ flankoj kaj la komerco inter ili prosperiĝas tagon post tago.

KVINGRENA BRANDO

En Yibin ĉie odoras alkoholaĵoj. Sur grandaj konstruaĵoj okulfrapas afiŝoj pri ili.

Kvingrena brando estas la reĝo de la vinoj de Yibin. Ĝi estas farita el fermentintaj sorgo, rizo, maizo, glueca rizo kaj tritiko per tradicia teknologio. Antaŭ 2 000 jaroj bo-oj la unuaj trovis sovaĝajn fruktojn nomatajn “ju”, kiuj fariĝis ebriiga vino post natura fermento. La vino siatempe estis nomata “marmelado

Ju”. En Ming-dinastio, en la urbo vinfarado jam populariĝis, aperis nombro da vinfarejoj, kiuj konkurenco inter si, kio plialtigis vinfaran teknologion, kaj sekve aperis fajnaj *daqu*-brandoj, el kiuj plej famis la brando farita el diversaj grenoj en Wendefeng. Ĝi estis la antaŭa speco de kvingrena brando. En 1929 la recepto de kelovino maturiĝis tagon post tago kaj formiĝis kompleto da teknologioj, inkluzive de materialo-elekto, gisto-farado, fermento kaj konservado. Por famiĝi ĝi alinomiĝis kvingrena brando. Ĝi distingiĝas per bonodoro, refreŝigo kaj harmonia gusto.

En Gulou-strato de la urbo funkcias antikva vinfarejo. En ĝi troviĝas fermentejo kun historio de 600 jaroj, la plej antikva en Ĉinio. Sub longa ligna konstruaĵo etendiĝas du vicoj da fermentejoj, ĉiu kun longo de 3 m, larĝo de ĉ. 2 m kaj profundo de 1 m. En la hermetika fermentejo odoras vino. La vinfarejo produktas alkoholaĵon per tradicia teknologio.

La nuna farejo de kvingrena brando estas granda moderna entrepreno kun jara produktokvanto de pli ol 4 000 tunoj. En 1988 en la Sesa Internacia Manĝaĵeksponicio de Hongkong serio de la kvingrena brando gajnis ordrankan premion, la ununuran plej altan premion. La vino vendiĝas en pli ol 130 landoj kaj regionoj. ■





La kunfluejo de tri riveroj en Yibin




La farejo de kvingrena brando



Antikvaj ioĝdomoj en Yibin



Pendantaj ĉerkoj



Anasoj peklotaj Foto de PI DAWEI

Vi skribis en la numero 11/89 sur paĝo 53 kadre de via serio "Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj" ion pri sangofekado. Mi opinias, ke la ofta kaŭzo de sangofekado estas kancero. Tion vi tute ne menciis en via artikolo. Kiam vi publikigas ion pri medicinaj aĵoj, vi devas pripensi, ke vi havas certan respondecon.

M. UHLENDORFF
(FR Germanio)

S-ro M. Uhendorff pravas. Ni dankas lin pro lia rimarkigo. Kvankam la diagnozaj rimedoj kaj nomoj estas diferencaj en la medicinoj okcidenta kaj ĉina, ni tamen devas konfesi, ke nia artikolo pri sangofekado estas tro simpla. Fakuloj diras, ke sangofekado estas tri-speca, t.e. sanga feko, peĉosimila feko (meleno) kaj feko kun kaŝita sango. La sanga feko ĝenerale havas 6 kaŭzojn, inkl. rektum-kanceron. La kaŭzo de meleno (digestotuba hemoragio) ne ekskluzivas stomak-kanceron. Se la pacientoj ĉiutage plurfoje ellasas fekon kun malhelruĝa kaj grandkvanta sango, sentante doloron en la subventro, tio montras, ke lin eble atakas ameba disenterio aŭ kojil-kancero.

La Red.

Sopiro al kampoj

Teksto de **ZHANG MEIZHI**

Fotoj de **LIU SIGONG**

ATINGINTE Harbin, mi tuj telefonis al Liang Jun, kiu estis raportita en nia revuo antaŭ 40 jaroj* kiel la unua traktoristino de la nova Ĉinio. Pasis jam 40 jaroj kaj kie ŝi estas hodiaŭ? Mi telefonis 8 fojojn kaj finfine trovis ŝin.

Je la interkonsentita horo, mi venis al ŝia hejmo. Ŝi jam atendis min ĉe la pordo. La 40-jara vivo sulkigis ŝian vizaĝon, grizigis ŝiajn harojn. Ŝiaj dentoj elfalis. Ŝi ne plu estas la vigla kaj brava knabino apud traktoro sur la foto, tamen ŝi restas sana, serena kaj rapidpieda. Ŝi multe ŝanĝiĝis, sed restas same vigla kiel antaŭ 40 jaroj.

Ŝi invitis min en sian varman domon, kie iuj preparis manĝaĵojn kaj aliaj ludis kun infanoj. Ili petis min sidiĝi, proponis al mi teon.

"Ho, kiel vigla estas via familio," mi diris.

"Vere, mia familio estas granda. Ĝi konsistas el 12 membroj: mi, mia edzo, 3 filoj, 3 bofilinoj, unu nepo kaj 3 familianoj de mia nevo. En la ordinaraĵoj tagoj ili ne estas hejme, sed hodiaŭ estas la Novjara Tago, ili ĉiuj revenis," kun rideto diris Liang Jun.

Ŝia nepo Pengpeng, aĝa unu jaron kaj duonon, estas sana, forta kaj tre aminda knabo. Vidinte sian

avinon, li tuj sin jetis al ŝia sino. Brakumante la nepon, Liang Jun rakontis al mi sian travivaĵon en tiuj 40 jaroj.

"En la infanaĝo mi lernis kelkajn jarojn en la kampara elementa lernejo. En 1945, antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, mia hejmloko estis liberigita. Estante mastro de sia lando, niaj samvilaĝanoj kun senlima ĝojo deziris kiel eble plej baldaŭ transformi la vastan kaj fekundan kampon kaj virgan teron en grandan grenejon. Ankaŭ mi estis infektita de tiu entuziasmo. Tiam mi rigardis sovetian filmon pri traktoristino kaj en mi naskiĝis aspiro fariĝi traktoristino. En 1948, mi eklernis konduki traktoron kaj post nelonge ellernis. Junie de 1950, fondiĝis en mia hejmloko la traktoristina trupo, mi fariĝis traktoristino kaj la trupestro."

"Poste mi lernis en Pekino. Unue mi lernis en kolegio kaj poste en la agrikultur-maŝina fakultato de la Pekina Agronom-inĝenierada Instituto. Tie mi diligente studis. Mi legis tagnokte. Kiam min atakis lacego kaj dormemo, mi lavis la kapon per malvarma akvo. Post nelonge mi malgrasiĝis je 5 kg. Mi, 1.65 metrojn alta, pezis nur 50 kg."

"En la instituto, mi amikiĝis kun k-do Wang. Ankaŭ li estis studento de nia instituto. Poste ni geedziĝis. Post gravediĝo mi ofte



Liang Jun (maldekstre) antaŭ 40 jaroj

saltis kaj kuris sur la sportejo, ĉar mi ne volis infanon, timante, ke ĝi malhelpos min en la lernado. Informite pri tio, nia direktoro severe kritikis min kaj malpermesis al mi partopreni la sportan kurson. Post kiam la bebo naskiĝis, mi konfidis ĝin al mia patrino kaj denove komencis lerni diligente. Fininte la studentan vivon, mia edzo instruis en Pekino, zorgante pri la filo, dum mi revenis en Harbin. Kiam mia filo havis 6 jarojn, mi estis okupita de provado de nova rikolta maŝino en kamparo, tute ekster mia atendo mi ricevis telegramon el Pekino, kiu sciigis, ke mia filo malsaniĝis. Mi estis klara, ke mia filo grave malsaniĝis, alie, Wang ne sciigis min. Kiam mi haste atingis Pekinon, mia filo jam adiaŭis la homan mondon.”

Je tio Liang Jun suspiris. Mi komprenis, ke tio montris ŝiajn profundan amon al sia filo kaj grandan konscienciproĉon.

Por rompi la silenton, mi prenis alian temon kaj demandis:

“Kiel vi sentas, rememorante la traktoristan vivon antaŭ 40 jaroj?”

“Al ĝi mi sopiras,” respondis Liang Jun senpripense.

“Tiam, en nia trupo estis 12 kna-

binoj, 5 el ili estis alilokanoj. Informite de ĵurnalo pri nia trupo, ili alvenis. Tiam nia tasko estis ekspluati la virgan teron. Junaj, ni ĉiuj tutforte laboris. Ni ofte laboris pli ol 10 horojn sen ripozo. Ni sentimaj, ofte laboris en obskura nokto. Kiam ni vidis, ke la vasta dezerto ŝanĝiĝis en fekundan kampon, ni estis senlime ĝojaj.” Liang Jun daŭrigis.

Tiam, s-ro Wang, edzo de Liang Jun, alportis al mi trinkaĵon. Li estas viro fervora kaj parolema. Kiam li parolis pri sia edzino, legiĝis sur lia vizaĝo nekaŝebla ĝojo. Li diris:

“Antaŭe mi kaj Liang Jun okupiĝis pri la sama laboro. Nun mi ŝanĝis mian profesion. El niaj filoj neniu sin okupas pri agronomio. Nun Liang Jun sola en nia familio okupiĝis pri tiu laboro. Dum tiuj jaroj ŝi okupiĝis ĉefe pri la popularigo de la agrikultura mekanikigo en la antaŭurbo de Harbin. Ŝi persone projektis kaj starigis 22 staciojn de agrikulturaj maŝinoj en nia urbo. Pro tio, Liang Jun ĝuis grandan honoron. Ŝi estis membro de la Unua, Dua kaj Tria Tutlanda Popola Kongreso de nia lando kaj unu el la unuaj landskalaj labormodeloj. En la 50-aj jaroj, kiel membro de la ĉina junulara delegacio, ŝi vizitis Sovetion. Nun ŝi funkcias kiel ĉefingenero de la

Harbina Agrikultura-maŝina Departemento kaj sola virino el superaj inĝenieroj tiufakaj en nia provinco.”

En la sekvantaj tagoj mi plurfoje telefonis al ŝi por viziti stacion de agrikulturaj maŝinoj, sed ŝi prokrastis mian viziton pro malsano de sia nepo. Tiutage, Liang Jun venis por akompani min. Elirinte el la komerca kvartalo de la urbo, nia aŭto rapide kuris sur la larĝa ŝoseo. Survoje, Liang Jun senĉese konigis al mi jen tion, jen alion. Ŝi montris per fingro maldekstren kaj diris, ke tio estas la Agrikultura-maŝina Instituto kaj Riparejo de Agrikulturaj Maŝinoj, kie ŝi funkciis kiel vicestro. Ŝi montris dekstren kaj diris al mi, ke tio estas la Agrikultura-maŝina Lernejo, kiu fondiĝis sub ŝia helpo kaj nun jam elbakis pli ol 7 000 lernantojn. Tie funkcias aŭtoriparejo, kies instalaĵoj estis importitaj el Japanio prizorgate de ŝi. El ŝia konigo sentiĝas profunda amo kaj fiero al la laboro.

Nia aŭto eniris iun grandan korton. Liang Jun informis al mi, ke tie estas la Yushuxiang-a Stacio de Agrikulturaj Maŝinoj, kompare granda stacio en Harbin. Vidinte Liang Jun, laborantoj de la stacio eldomiĝis por bonvenigi ŝin kaj intime nomis ŝin instruistino Liang. Liang Jun diris al mi, ke ŝi estas familiara kun laborantoj de ĉiuj stacioj, ĉar antaŭe ŝi pasigis plejparton de la tempo en kamparo por kontroli agrojn, aŭskulti raporton kaj fari gvidan laboron. Jam en 1963, kiam ŝi estis juna traktoristino, ŝi konatiĝis kun la estro de la Yushuxiang-a Stacio. Kiajn ajn bongustaĵojn ili havis, ili certe restigis iom al ŝi.

“Same kiel aliaj stacioj, ankaŭ en tiu ĉi stacio funkcias riparejo kaj granda klasĉambro. Antaŭe niaj stacioj kulturis teron por kamparanoj per ŝtataj maŝinoj, sed post ekpraktiko de la laŭkontrakta respondeca sistemo en la kamparo, pli kaj pli multaj kamparanoj havas sian propran maŝinon, tial la stacio fariĝis servejo, kies ĉefa tasko estas



Kontrolo de agrikulturaj maŝinoj

Liang Jun

doni konsultiĝon pri teknikoj, ripari maŝinojn kaj trejni kamparanojn.” Liang Jun konigis al mi.

Sur la revena vojo, mi demandis Liang Jun, kion ŝi deziras en la estonteco. Iom pripensinte, ŝi respondis:

“Baldaŭ mi estos 60-jara. Mi volas fari pli multe, tamen mi devas lasi la gejunulojn aranĝi la aferojn de nia departemento. Mi okupiĝas ankaŭ pri la laboroj de virinoj kaj scienca asocio. En la estonteco mi volas kolekti referencajn materialojn. Mi havas feliĉan familion kaj mi certe en ĝojo pasigos miajn lastajn jarojn...”

Kun cigaredo bruligita en la mano, Liang Jun donis al mi kontraŭluman figuron en la sunsubiro. Mi ne klare vidis ŝian vizaĝon, sed mi sentis el ŝia parolo la feliĉon de la koro. ■

* Legu la artikolon “La Unua Virina Traktorista Trupo en Ĉinio” en n-ro 6, 1950 de EPC.



Liang Jun kaj ŝiaj familianoj en ferio



Jia Yucun Reakiris la Oficon per Kajola Parencigo Lin Daiyu Adiaŭis Sian Patron por Veturi al l' Avino

(La tria ĉapitro el la romano "Songô en la Ruĝa Buduaro")

JIA Yucun akceptis la proponon de Leng Zixing kaj diris adiaŭon. Li hastis returne por sin konvinki per informo en registara bulteno.

En la sekva tago li petis helpon de Lin Ruhai.

"Koincide!" aplaŭdis Ruhai. "De post la forpaso de mia edzino la bopatrino maltrankvilas pro mia filino, pensante, ke ŝin neniu prizorgas, nek bone edukas ĉi tie. Venis jam boatoj kun viroj kaj virinoj por ŝin porti al la ĉefurbo, sed tiam la filino ne tute resaniĝis, mi do prokrastis ŝian foriron. Nun mi ja volas sendi ŝin al la ĉefurbo. Mi multe dankas vin pro via fervoro en la edukado de mia filino, sed ne havis la ŝancon vin rekompeni. Nun ĝi venas. Estu trankvila! Mi jam pretigis leteron al mia bofrato, ke li laŭeble vin helpu. Ankaŭ pri la elspezo ne zorgu! Mi jam bone aranĝis la aferon. Ĉio ĉi atestu mian sincerecon!"

Yucun klinis sin riverence kaj diris mil dankojn. Poste li demandis: "Ĉu mi povus scii la nunan postenon de via estimata bofrato? Mi timas esti tro trudema."

Ruhai kun rideto respondis: "Fakte mi havas du bofratojn, sambranĉajn al vi. Ili estas nepoj de la Duko Rongguo. La pli aĝa, Jia She, kun la adoltiĝa nomo Enhou, heredis la generalecon de la unua rango; la malpli aĝa, Jia Zheng, kun la adoltiĝa nomo Cunzhou, funkcias kiel vicestro de iu departemento sub la Konstrua Ministerio. Tiu ĉi lasta estas ĉiam ĝentila kaj bonkora, nek aroganta nek diboĉema, kun la karaktero de sia avo. Li neniom similas al tiuj, kiuj galantas kaj facile koruptiĝas. Mi skribis la leteron ĝuste al li. Alie, mi ne nur makulus vian honoron kaj noblecon, sed ankaŭ ne pardonus min mem."

Nur aŭdinte tion Yucun kredis la vortojn de Leng Zixing. Li devove dankis la patron de lia lernantino.

"Mia filino ekiros la duan de la venonta monato," daŭrigis Ruhai. "Ĉu ne estus pli oportune, se vi kune vojaĝus?"

Yucun konsentis kaj ankaŭ kontentis. Li akceptis donacojn kaj ĉion por la vojaĝo, pretigitajn de Ruhai.

La lernantino, nomata Lin Daiyu, ĵus resaniĝinte, malinklinis forlasi sian patron. Sed ŝia avino volis, ke ŝi

nepre iru al ŝi. Cetere, Ruhai admonis ŝin:

"Mi, 50-jara, ne havas la intencon reedziĝi. Vi estas tiom malforta kaj juna, sen panjo vin edukanta, sen frato kaj fratino vin helpantaj. Vi trovos varmon kaj apogon ĉe ŝi kaj inter la knabinoj en la domo de viaj onkloj. Kaj mi povos trankviliĝi. Kial vi ne volas?"

Daiyu kun larmoj adiaŭis la patron. Ŝi enboatiĝis kun sia vartistino kaj kelkaj oldaj servistinoj el la Domo de Duko Rongguo.

Yucun veturis per alia boato, kun du servoknaboj, sekvante la boaton de Daiyu.

Post kelkaj tagoj ili atingis la ĉefurbon. Yucun sin ordigis kaj direktis al la Domo de Duko Rongguo, akom-



panate de l' servoknaboj. Antaŭ la pordo li montris vizitkarton sur kiu li titolis sin nevo de Jia Zheng.

Jia Zheng jam legis la leteron de Lin Ruhai. Li akceptis Yucun. Li forte impresiĝis de l' altastatura figuro de Yucun kaj eleganteco de ties parolo. Li ja plej ŝatis klerulojn kaj, simile al sia avo, montris sin afabla kaj helpema al la subuloj. Li do donis apartan favoron al Yucun, rekomenditan de sia bofrato. Li ne domaĝis sian forton por helpi Yucun. Fine en la tago, kiam peticio prezentigis al la Imperiestra Majesto, Yucun facile rehavis sian rangon kaj ricevis la rajton atendi plenigon de vako. Post malpli ol du monatoj tia ŝanco venis el la prefektejo Yingtian de Jinling. Li adiaŭis Jia Zheng kaj vojaĝis tien por la ofico.

Nun ni nin returnu al Daiyu!

En la tago, kiam ŝi surbordiĝis el la boato, palankenoj kaj ĉaroj de l' Domo de Duko Rongguo ŝin atendis.

Ŝi iam aŭdis de sia patrino, ke majesteco kaj lukso regas en la hejmo de l' Avino. En la lastaj tagoj ŝi jam propraokule vidis kiel malavare elspezis en la ĉiutaga vivo tiuj akompanantaj servistinoj el la plej suba tavolo. Nun ŝi mem estos en la avina domo kaj devas esti singardema je ĉiu paŝo en ĉiu momento, diskrete paroli kaj sobre moviĝi, por ne esti mokata.

Palankeno portis ŝin en la urbon, dume ŝi rigardis eksteren el la palankeno. Ha! Kia mondo! Vivoplenaj la stratoj, neniam viditaj. Post longa tempo ŝi atingis la straton, sur kies nordo du gigantaj leonoj el ŝtono kaŭris ambaŭflanke de pordego kun bestokapaj teniloj. Antaŭ la pordo side vicis pli ol dek homoj, lukse vestitaj. La meza pordo fermita, kaj oni iris nur tra la du flankaj. Super la meza pordo pendis tabulo, sur kiu legiĝis "Domo de Duko Ningguo, konstruita laŭ la ordono de Lia Imperiestra Majesto". Daiyu pensis: Certe la domo de la bofrato de la Avino!

La palankenoj iris plu okcidenten. Kaj baldaŭ ili atingis alian pordon. Jen la Domo de Duko Rongguo! La meza pordo same fermita. La palankenoj sin ŝovis tra la flankaj pordo. Portistoj paŝis la distancon de sagopafo kaj, anstataŭ ŝanĝi la direkton, demetis la palankenojn kaj sin retiris. La oldaj servistinoj, kiuj servis al Daiyu, eliĝis el palankenoj. Venis kvar belaj junuloj, kiuj portis la palankenon akompanate de l' servistinoj antaŭe kaj malantaŭe, ĝis la korta pordo ornamita per lignaj gravuritaj floroj ĉirkaŭe. La kvaroj deŝultrigis la palankenon kaj eliris. Nun servistinoj levis la kurtenon kaj helpis al Daiyu eliĝi. Subtenate de la servistinoj, ŝi paŝis tra la pordo.

Interne etendiĝis verandoj ambaŭflanke, kondukantaj al la traira halo, en kiu staris marmora ekranego, pterokarpe framita. Tri salonoj malantaŭ la ekranego frontis al la vasta korto de l' centra konstruo, en kiu kvin ĉambroj vice fasadis transe, kun traboj gravuritaj kaj kolonoj pripentritaj. Kaj sur la du flankoj de l' korto, paralelaj ĉambroj kun subgablaj pasejoj, super kiu ĉe la tegmenta rando pendolis kaĝoj en kiu pepis buntaj papagoj, turdoj kaj alispecaj birdoj.

Pluraj servoknabinoj, bele vestitaj, tuj leviĝis de la perono, vidinte ilin. Kun rideto ili iris renkonte al ŝi, lirlante: "Ho, vi jam venas! La Avino ĵus menciis vin."

Knabinoj kuris levi la pordan kurtenon kaj anoncis: "Fraŭlino Daiyu jam venas!"

Enirinte, Daiyu vidis maljunulinon kun arĝenta hararo subtenatan de du homoj, kaj konstatis, ke tio estas ŝia avino. Antaŭ ol ŝi koŭtoŭisis, la Avino jam premis ŝin al sia sino kaj laŭte ploris murmurante "Mia koro! Mia trezoro!"

Ĉiuj apudstarantoj kovris al si la larman vizaĝon. Ankaŭ Daiyu ne povis sin deteni de ploro. Tio daŭris ĝis oni sukcesis konsoli; kaj Daiyu koŭtoŭisis antaŭ la Avino.

Nun la Avino prezentis la ĉeestantojn al ŝi: "Tiu estas via unua onklino; kaj tiu, la dua; kaj tiu estas via bofratino, la edzino de via kuzo Zhu."

Daiyu riverence salutis ilin laŭvice.

Kaj la Avino aldonis: "Venigu la knabinojn! Jam gasto de malproksime. Ili do ne lernu hodiaŭ."

Ĥo sonis el amaso da servistinoj, kaj du foriris por plenumi la ordonon.

Baldaŭ ili aperis, en akompano de tri vartistinoj kaj ses servoknabinoj. La unua, ĉarme graseta, mezalta kun vangoj rememorigantaj freŝajn liĉiojn kaj la nazo, belkolora, kvazaŭ anserida graso, estas tenera, silentema kaj tre aminda. Jen la dua estas pli altastatura kun ŝultroj stretaj, talio minca kaj la ovala vizaĝo radianta per la okulparo elokventa kaj rava sub la longetaj brovoj. Rigardante ŝin, tiom elegantan kaj spritan, oni povis senti ion altan forgesante ĉion trivialan. Sed la tria estis nur infano, kun naiva vizaĝo kaj nesufiĉa alto. Ili portis samajn ornamojn kaj kostumojn.

Daiyu tuj leviĝis salute al la trio, kiu sin prezentis al ŝi. Ĉiuj sidigis. Kaj servoknabinoj alportis teon.

La Avino falis denove en triston, aŭskultante la rakonton pri tio, kiel la patrino de Daiyu malsaniĝis; kiel kuracisto diagnozis kaj preskribis; kaj fine, kiel ŝi mortis kaj la funebro iris.

"Mi plej amas vian panjon el miaj filinoj," ŝi diris al Daiyu. "Sed ŝi forpasis antaŭ mi, sen revido! Kiel mi povas ne afliktiĝi vidante vin!" Ŝi denove brakumis Daiyu kaj singultis, dum la aliaj ŝin konsolis.

Oni vidis, ke Daiyu, kvankam tre juna, estas distingiga en la konduto kaj parolo. Korpa feblo kaj delikateco ne povis kaŝi ŝian nature dotitan elegantecon. Perceptinte denaskan debilon ĉe ŝi, oni demandis, kiun medikamenton ŝi ofte prenas; kial ŝi ne tuj vizitis kuraciston.

Ŝi respondis: "Ĉiutage, de post la demamigo mi ja komencis preni medikamenton. Multaj famaj kuracistoj penis, sed ne sukcesis. Oni diris, ke foje venis fava bikŝuo, kiu volis forporti min, tiam nur trijaran, al beginejo, sed paĉjo kaj panjo rifuzis. La bikŝuo do diris: 'Se vi domaĝas, ŝi neniam resaniĝos. Detenu ŝin de l' aŭdo de ploro kaj vido de ĉiuj parencoj de la patrino flanko, alie ŝi ne kvietiĝos en la vivo.' Lian absurdon ĉiuj ignoris. Nun mi daŭre prenas bolusojn Renshen Yan-grong Wan."

"Bone," diris la Avino. "Ni faras mem tiajn bolusojn. Mi informos, ke ili faru pli da, por vi."

Apenaŭ la Avino finis sian parolon, rido kaj krio sonoris el la malantaŭa korto.

"Ha ha ha! Mi malfruas por bonvenigi la malproksiman gaston!"

Daiyu surprizite pensis: “Tiuj ĉi sin tenas seriozaj kaj respektplenaj tiel, ke eĉ la spiro subpremiĝas. Sed kiu estas la alvenanto, tiom tumultema kaj impertinenta?”

Jen aŭrora figuro eniris el la posta pordo de la ĉambro akompanate de svarmo da servistinoj. Frapa lukso, kva-zaŭ feino, surkape floroj el agato kaj jado kaj perloj pritreditaj per ora fadeno, harbroĉoj en la formo de kvin feniksoj kun pendantaj perloj; ĉirkaŭkole gema koliero, kiu tenis volvitajn drakon el pura oro. Ĉe la jupo, ligita per pize verda zono el silko, pendis romba paro el roza jaspas. Ŝi surhavis ruĝsatenan jaketon kiu pompis per cento da ore broditaj papilioj ŝvebantaj super floroj, kaj sur ĝi sciurfelan pelton, tegitan per grizblua silko kolore pridesegnita. Kaj la jupo el smeralda krepo ne malpli ŝikis, kun mozaiko da floroj kaj desegnoj enkudritaj. Ja ŝiaj

paro da feniksaj okuloj

duo da longaj kaj flirtopretaj brovoj

figuro svelta

moviĝo facila

Severo latentaj sub printempo de l' vizaĝ' pudrita rideto vidata antaŭ malfermo de lipoj karmezinaj.

Daiyu tuj leviĝis renkonte al ŝi.

“Vi ne konas ŝin,” la Avino ekridis kaj klarigis. “Jen temerarulino kun akra lango. En la sudo estas ‘pipro’. Nu, nomu ŝin Pipra Xifeng!”

Daiyu ne sciis kiel adresi saluton. Ŝiaj kuzinoj tuj montris, “Ŝi estas de frato Lian.”

Daiyu ekmemoris la diron de l' patrino, ke Jia Lian, filo de l' unua patrinflanka onklo Jia She, prenis nevinon de l' dua patrinflanka onklino Wang kiel sian edzinon; en ŝia infaneco oni donis al ŝi la nomon Xifeng kaj edukis ŝin kiel knabon. Daiyu ŝin salutis kun rideto, per la voko “bofratino”.

Tenante la manojn de Daiyu, Xifeng ŝin pririgardis de la kapo ĝis la piedoj kaj poste residigis ĉe la Avino, antaŭ ol elruli ridon.

“Kia ĉarmo, unuafoje vidita!” ŝi trilis. “La tuto elspiras, ke fratino Daiyu devus esti propra nepino de la Avino, anstataŭ filino de ŝia bofilo! Jen kial nia Avino vin forgesas nek en la koro nek en la buŝo. Sed ho ve! Nia kuzineto! Kia sorto vin trafis, via patrino forpasis!” Ŝi tuŝis al ŝi la okulojn per poŝtuko.

“Mi apenaŭ liberiĝis de tio. Ne malĝojigu plu!” diris la Avino kvietige. “Via malforta kuzino ĵus finis la longan vojaĝon. Ankaŭ ŝi apenaŭ trankviliĝis. Ne menciigu plu tion!”

Xifeng prompte sin turnis en ĝojon. “Ja ja! Mi ekvidis la kuzineton kaj tuj raviĝis. Kaj ĝojo, kaj malĝojo. Mi forgesis la Avinan Moŝton. Puninde! Puninde!” Kaj ŝi denove levis la manon de Daiyu kaj demandis ŝin:

“Kiomjara vi estas? Ĉu vi vizitis lernejon? Kiun medikamenton vi prenas? Ne sopiru al la hejmo! Diru al mi, kiam vi deziros ion por manĝi aŭ distri. Diru ankaŭ, kiam iu ajn vartistino aŭ servistino malbone traktos vin.”

Post momento ŝi sin turnis al la servistinoj. “La pakoj de mia kuzineto enportigis? Kiom da servistinoj ŝin sekvas? Iru bonordigi ĉambrojn por ke ili tie ripozu!”

Dume oni alportis teon kaj fruktojn. Xifeng persone

servis.

“Ĉu la monata poŝmono jam disdonita?” demandis Matrono Wang.

“Jam,” respondis Xifeng. “Mi ĵus kondukis homojn al la supra tenejo. Tie ni longe serĉis, sed neniel trovis la brokaton, kiun vi menciis hieraŭ. Eble vi mismemoras?”

“Ne gravas. Necesas preni du pecojn da ŝtofo por vestoj de via kuzino. Faru tion vespere! Ne forgesu!”

Mi anticipis. Mi pensis, ke la kuzino atingos en kelkaj tagoj. Mi do pretigis la ŝtofon. Bonvolu kontroli kaj mi resendu ĝin al ŝi!”

Matrono Wang respondis per rideto kaj kapklino.

Oni finis la manĝeton. La Avino ordonis al du vartistinoj konduki Daiyu viziti la du onklojn. Ĝuste tiam Matrono Xing, edzino de Jia She, leviĝis kaj turnis sin al la Avino kun rideto. “Pli oportune, ke mi konduku la nevinon.”

“Tre bone,” konsentis la Avino. “Kuniru! Vi ne bezonas reveni.”

Matrono Xing diris “Jes”, kaj diris kune kun Daiyu “Ĝis la revido!” al Matrono Wang. Ĉiuj akompanis ĝis la traira halo.

Servoknaboj jam atendis ĉe la ĉaro kapuĉita per bluverda silkaĵo antaŭ la sama kortopordo.

Matrono Xing kaj Daiyu enĉariĝis. La vartistinoj malleviis la kurtenon, kaj Xing ordonis al la servoknaboj porti la ĉaron al vasta spaco. Poste mulo ĝin eltiris tra la okcidenta flanko pordo orienten preter la ĉefa pordego de l' Domo de Duko Rongguo. La ĉaro moviĝis tra larĝa nigre lakita pordo kaj haltis interne ĉe ceremonia pordo. Post kiam la servoknaboj eliris, la kurteno leviĝis kaj Matrono Xing subtenis Daiyu je la mano, eliĝis kun ŝi kaj paŝis en la korton.

Ŝajnis al Daiyu, ke la korto, kvankam ĉirkaŭita de ĉambroj kaj aliaj konstruaĵoj, najbaras al ĝardeno de l' Domo de Duko Rongguo. Ceremonia pordo kondukis tra peristilo laŭ flankaj ĉambroj al la fasadaĵoj, ĉiuj fajne kaj delikate dekoritaj, tute diferencaj de la grandiozaj en la alia korto. Kaj plie ĉi tie pompas arboj, belas artefarita monto kaj groteskaj rokoj sur ĝi.

En la meza salono atendis jam multe da servistinoj, brile vestitaj. Matrono Xing sidigis Daiyu kaj sendis voki Jia She, kiu troviĝis en ekstera kabineto.

La sendito revenis kaj raportis: “Lia Sinjora Moŝto diris, ke li malbone fartas de pluraj tagoj, tial la intervado povus malĝojigi ambaŭ; pli bone do ne nun. Lia nevinino ne ĉagreniĝu nek sopiru al la naskoloko. Estas ja hejme ĉe la Avino kaj onklinoj. Ŝiaj kuzinoj, kiom ajn malspritaĵoj, povas ludi kun ŝi kaj forigi enuon. Se io malagrabra okazos, ŝi diru kaj ne rigardu nin fremdaj!”

Daiyu starante notis ĉiujn vortojn en la kapo.

Ŝi residigis, kaj post kelka tempo denove sin levis por foriri. Matrono Xing insistis, ke ŝi prenu ĉi tie la vespermanĝon. Sed tiu fordankis.

“Ho, onklino! Ne decus rifuzi vian inviton. Sed mi devas viziti la duan onklon. Mi malfrue irus al li, se mi vespermanĝus ĉi tie, kaj tio estus malrespekto al li. Mi do venos alfoje, ĉu bone? Mi esperas, ke vi min indulgos.”

“Prave!” diris Matrono Xing kun rideto.

Ŝi ordonis al du vartistinoj, ke ili sekvu la saman ĉaron. Ŝi mem akompanis Daiyu ĝis la ceremonia pordo kaj donis instrukciojn al la vartistinoj. Poste ŝi reiris, ilin sekvinte per la okuloj ĝis kiam la ĉaro iris for.

Daiyu reatingis la Domon de Duko Rongguo kaj elĉarigis. Tiuj vartistinoj kondukis ŝin orienten en trairejon al la halo, kiu rigardis suden. En vasta korto post ceremonia pordo en la nordo vicis kvin grandaj ĉambroj. La orientaj kaj la okcidentaj estas kunligitaj per pordeto en la gablo al la alaj ĉambroj. La tuta ensemblo do impresis multe pli impone ol aliaj domoj. Daiyu jam perceptis, ke tio estas la trunka parto de l' Domo. Supre de l' meza halo transversis nigra tabulego kun naŭ oraj drakoj kaj tri grasaj ideogramoj sur si: Rong Xi Tang (Gloro, Feliĉa Halo), sub kiu legiĝis la vortoj “Lia Imperiestra Majesto benis per tiu ĉi tabulo Jia Yuan, la Dukon Rongguo”, kaj la dato kun subskribo kaj stampo de l' Majesto.

Kaj interne de la halo: antikva tripeĉa poto el bronzo, alta ĉirkaŭ unu metron, sur granda tablo el pterokarpo. Kaj sur la muro, kakemono de nigraj drakoj super tajdo, simbolo de alta rango. Ambaŭflanke de l' pentraĵo, sur tabloj, staris ora vazo kaj vitra bovlo.

Matrono Wang loĝis kaj prenis manĝojn ne en tiu ĉi halo, sed en iu el la tri ĉambroj de l' orienta alo. La vartistinoj do kondukis Daiyu tien.

Ĉe la fenestro kuŝis granda terlito, kovrita per skarlata ekzota tapiŝo, sur kiu mezis ruĝaj mankusenetoj kaj longa, verde flava matraco — ĉiu el la litaĵoj portis sur si medalionajn brodojn de drakoj. Ambaŭflanke paro da ekzote farbitaj tabletoj, kiuj havis la formon de umea floro. Sur la maldekstra tableto odoris antikveca incensujo tripeĉa, spateloj, bastonetoj kaj staktoskatolo; kaj sur la dekstra graciis svelta porcelana vinujo, bakita de Ruzhou en Song-dinastio, kun freŝaj floroj bonodorantaj ene. Okcidente de l' planko vicis kvar seĝoj tegitaj per punca silko kun broditaj floroj, kaj sub ili po unu skabelo. Ambaŭflanke de l' vico staris paro de altaj tabloj, primetitaj per tetasoj, florpotoj kaj aliaj objektoj. Jam ne necese priskribi detale ĉion alian en la ĉambro.

Vartistino petis, ke Daiyu sidu sur la terlito kun du satenaj sidkusenoj. Konsiderinte sian pozicion Daiyu sin turnis al iu el la seĝoj. Ĉambristino prezentis teon. Trinkante ĝin, Daiyu observis la vestojn kaj konduton de l' ĉambristinoj kaj trovis ilian diferencon disde tiuj en aliulaj hejmoj.

Antaŭ ol ŝi finis la trinkadon, servistino en ruĝa atlasa kostumo kaj blua veŝto silke borderita alŝvebis kaj ridete diris: “Ŝia Matrona Moŝto volas, ke fraŭlino Daiyu iru tien.”

La vartistinoj kondukis Daiyu laŭ la orienta koridoro al malgranda apartamento konsistanta el tri suden rigardantaj ĉambroj.

Libroj kaj teservico okupis tableton sur la terlito. Malnovetaj dorsapogiloj kaj mankusenetoj el glaŭka sateno sidis ĉe la orienta muro. Matrono Wang sidis ĉe la okcidenta muro, sin apogante sur dorsapogilo ankaŭ ne nova el samspeca silko.

La Matrono petis Daiyu sidiĝi oriente. Konjektinte, ke tio estas la sidloko de l' onklo, Daiyu sin turnis al iu el la tri seĝoj ĉe la lito, tegitaj per ne tre nova ŝtofo kun

nigra desegno formita post ŝprucigo sur ajuran paperon. La onklino plurfoje petis ŝin sidiĝi ĉe ŝi kaj Daiyu obeis. La Matrono komencis paroli.

“Hodiaŭ via onklo fastas. Do vidu lin aliffoje! Mi devas diri ion al vi. Viaj tri kuzinoj estas tre bonaj. Vi povos lerni legadon, kudradon kaj trikon kune kun ili, kaj ankaŭ ludi, eĉ petoli. Ĉio ĉi ne gravas. Tamen io plej forte min maltrankviligas, tio estas la terura filo, demono en la hejmo. Hodiaŭ li iris al templo plenumi voton. Vi mem vidos, vespere, kiam li revenos. Lin ignoru! Ankaŭ viaj kuzinoj ne kuraĝas lin provoki.”

Daiyu plurfoje aŭdis de sia patrino, ke la dua onklino naskis filon tenantan jaden en la buŝo. Li estas terure petolema, malŝatas lernadon kaj plej emas pasigi tempon en knabinaj rondoj. Sed neniu aŭdacas lin admoni, ĉar la Avino tro dorlotas lin. Aŭdinte la parolon de l' onklino, ŝi divenis, ke temas ĝuste pri tiu kuzo. Ŝi do demandis kun rideto:

“Ĉu, onjo, vi menciis la pli aĝan kuzon naskitan kun jado en la buŝo? Mia patrino ofte rakontis pri li. La kuzo pli aĝas ol mi je unu jaro. Lia nomo estas Baoyu (Trezora Jado). Li, kvankam bubaĉo, bone traktas siajn fratinojn. Mi pasigos la tagojn, kompreneble, kun miaj kuzinoj, disde la kuzoj, do, nenia okazo lin provoki, ĉu ne?”

Ridis Matrono Wang. “Vi ne komprenas. Li ne estas ordinara knabo. La Avino lin amegas, kaj li jam kutimas dorlotiĝi eĉ inter la knabinoj. Se ili ignoras lin, li fariĝas kvieta. Sed, se la knabinoj iom pli multe parolas al li kaj li ekĝojas instigite, ĉio skandala povas aperi. Ĝuste pro tio mi admonas, turnu neniom da atento al li! Li nur kapricas. Jen mielajn vortojn, jen stultaĵon kaj frenezajn. Nenion prenu serioze ĉe li!”

Daiyu kape jesis kaj jesis.

(Daŭrigota)

1. Kouŝtoŭi: genuiĝi kun la kapo ĝis la tero.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Ĉina Ĉigong-o

de XU SHITIAN*

Por niaj legantoj ĉigong-o eble ne estas vorto fremda, ĉar en nia revuo ĝi aperis plurfoje. Kaj plie, en la lastaj jaroj Ĉinio sendis eksterlanden delegaciojn de ĉigongistoj kaj ili faris prezentadon por alilanda publiko. Tamen iuj alilandanoj opinias, ke ĉina ĉigong-o estas danĝera kaj terura, rigardinte, kiel oni pikas la gorĝon al ĉigongisto per lanco kaj kiel ĉigongisto kuŝas sur ŝtala forko, dum aliaj opinias, ke ĉina ĉigong-o estas mistera, rigardinte, kiel ĉigongisto piede staras sur ovoj. Sed ni devas montri, ke laŭ nocio de ĉigong-o, la supre menciitaj prezentoj apartenas al la kategorio de akrobatiko, sed ne al ĉigong-o. De ĉi numero ni aperigos artikolojn pri ĉina ĉigong-o kaj korposanigaj ekzercoj per ĉigong-o.

— La Red.

I. KIO ESTAS ĈIGONG-O?

Por koni ĉigong-on, antaŭ ĉio, oni devas havi la koncepton pri tiu ĉi vorto. Pri tiu ĉi problemo nun ankoraŭ iras disputo en la rondoj de ĉinaj ĉigongistoj, sed plejparto de ili opinias, ke ĝi estas procezo de ekzercado, en kiu la homoj, gvidate de la subjektiva konscio, per reguligo de la teniĝo, spiro kaj atento celas kuraci malsanon, plii-

gi harmonion de la organismo, protekti la sanon kaj levi la vivipovon, tiamaniere ili povas havi ĝustan koncepton pri ĉigong-o.

En la historio ĉinaj medicinistoj inventis multajn metodojn de ĉigong-terapio. En la Orienta Handinastio (25-220) Hua Tuo inventis "Ludoj de Kvin Bestoj". Sun Simiao de Tang-dinastio (618-907), surbaze de la atingoj de la antaŭ-

uloj, elpensis "Sanprotektaj Ekzercoj de Ses Sonoj". Li Dongyuan de la dinastioj Jin (1115-1234) kaj Yuan (1206-1368) iniciatis "Kvieta Sidado". Ĉiu el tiuj metodoj devas esti farata per reguligo de la atento, spiro kaj teniĝo kun la celo kuraci malsanon, protekti la sanon, longigi la vivon ktp. Ili konformas al la nocio de ĉigong-o kaj oni nomas tian metodon medicina ĉigong-terapio.

Ekzercantoj de ĉigong-o



Inter taoistoj de Ĉinio cirkulas la aforismo "Mia vivo estas decidita de mi mem, sed ne de la ĉielo". Laŭ taoismo oni opinias, ke la homoj povas regi sian organismon, longigi la vivon, kaj supozas, ke ili povos ekzisti kune kun la ĉielo kaj tero. Por realigi sian supozon, la monaĥoj de ĉiuj dinastioj, observante la fundamentan principon ripozi por sin refreŝigi, reguligi la atenton, spiron kaj teniĝon, kreis multajn korposanigajn metodojn. Parto de ili apartenas al la kategorio de pensado kaj spirado kaj plejparto de ili portas jenajn trajtojn: Priskribante ĉigong-on, oni komparas ĝin kun rafinado. Ili komparas la korpon kun fajrujo (forno), la esencon kaj ĉi-on kun brulmaterialoj, la atenton reguligantan la spiron en la ekzercado kun brul-intenseco kaj la rezulton de longtempa ekzercado, t.e., la konglomeraĵon, kun interna pilolo. En la rondoj de ĉigongistoj oni kutime nomas la priskribitan ĉigong-on ĉigong-o de la skolo de interna pilolo aŭ taoisma ĉigong-o.

Ŝakjamunio, la fondinto de budhismo, opiniis, ke dum la tuta vivo la homoj multe suferas de naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto kaj okazas al ili metempsikozo. Por sin liberigi el la abismo de mizero kaj atingi nirvanon, budhistoj de ĉiuj dinastioj kreis diversajn ekzerco-metodojn, kiaj sidado en kontemplado, jogo. Ili ĉiuj estas farataj sub gvidado de la subjektiva konscio de la ekzercantoj, kaj estas trafenitaj de meditado de la komenco ĝis la fino. La longa praktikado de tiuj ekzercoj povas iagrade levi la harmonion de la organismo de la ekzercantoj kaj rehavigi al ili la naturan povon kuraci sin, pliigi la inteligentecon de la cerbo kaj eĉ eksciti la latentajn kapablojn de la homa korpo. Pro tio ni nomas tiujn metodojn budhisma ĉigong-o.

En la antikveco multaj eminentaj konfuceanismaj intelektuloj alte taksis fizikan memkulturadon. Ili ne nur dediĉis grandan atenton al ekzercado per ĉigong-o, sed ankaŭ publikigis prozaĵojn, poemojn kaj aliajn verkojn pri ĉigong-o.

La ĉefa metodo en ilia ĉigong-ekzercado estis kvietaj sidado. Krom fizika memkulturado, ili rigardis ĉigong-ekzercadon ankaŭ kiel metodon de klerigado kaj ideologia kulturado. Tio estas konfuceanisma ĉigong-o.

Ĉinio estas konata kiel hejmloko de uŝuo. Surbaze de la spirada kaj konduka metodoj de ĉigong-o, ĉinaj uŝuistoj de diversaj dinastioj kreis multajn ekzercojn kun la celo levi luktopovon en studo kaj disvolvo de uŝuo. Tion ekzemplas la ĉinaj boksartoj *ŝingjiĉuan*, *tajĝjiĉuan*, "okdiagramo", kaj ankaŭ orkloŝo, fer-bluzo k.a., per kiuj ekzercas sin la bonzoj de Shaolintemplo.

La supre diritajn metodojn ni povas resumi en la kategoriojn kvietan kaj movan. Ekzercante sin per la unua metodo, oni ne moviĝas, dum per la dua oni senĉese ŝanĝas siajn pozojn.

Ĉu la kvietaj ĉigong-o, ĉu la mova, antaŭ ĉio, ili ambaŭ sanigas la menson kaj korpon de la ekzercantoj. Ĉar ĉigong-o estas efika por rehavigi al la ekzercantoj la naturan kuracpovon, tial ĝi povas kuraci ne nur multajn oftajn malsanojn, sed ankaŭ iujn malfacile kuraceblajn per moderna medicino. Tion pruvis la praktiko de multaj kanceruloj, kiuj ekzercas sin per ĉigong-o.

Krom kuracado kaj sanprotektado, ĉigong-ekzercado ankaŭ povas reguligi la humoron, rehavigi la psikan ekvilibron, pliigi la inteligentecon de la cerbo kaj eksciti la latentajn kapablojn de la homa korpo, ĉar en la homa korpo estas fluidaj energioj. Ekzercinte sin per ĉigong-o 1-3 monatojn, oni povas eligi sian fluidan energion eksteren por kuraci aliajn aŭ fari sciencan eksperimenton.

El la supre menciitaj, niaj legantoj povas bone vidi, ke ĉina ĉigong-o ne estas mistera nek tro malfacila.

* La aŭtoro instruas en la Pekina Ĉigongologia Instituto.


FORMACIOJ DE LA POSTA MOVFARANTO

Ili estas uzataj de la posta movfaranto en ŝakludo. Ĉar la posta movfaranto estas pasiva en formaciigo, li devas apliki respondan formacion al tiu de la antaŭa movfaranto. Jen ok formacioj ofte uzataj:

A. Ĉevala ekrano: Movi la ĉevalon sur la 2-a linio antaŭen al la 3-a aŭ tiun sur la 8-a al la 7-a. Tia aranĝo ebligas kapti ŝancon por kontraŭataki en defendo, ĝi estas ofte uzata kaj plej varia formacio kontraŭ la atako de la antaŭa movfaranto.

B. Samflanka kanono: Kiam la antaŭa movfaranto movas la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a, la posta movfaranto movas la kanonon sur la 8-a linio dekstren al la 5-a, por formi kontraŭatakan staton. Tio estas plej antikva formacio en la ĉina ŝako. Ĝi havas grandan kontraŭatakan forton, povas aliformiĝi en formacion de ĉevala ekrano aŭ tiun de palaco-angula kanono kaj povas ankaŭ turniĝi de atako en defendon, sed unu mismo povas estigi malvenkon.

C. Kontraŭflanka kanono: Se la antaŭa movfaranto movas la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a, la posta movfaranto movas ankaŭ la kanonon sur la 2-a linio al la 5-a. Tion oni nomas aranĝo de kontraŭflanka kanono. Per tia aranĝo ambaŭ ludantoj koncentras sian forton en unu flankon por



Ĉina ŝako (V)

de RONG HUI

ataki, samtempe lasante sian alian alon facile ataki de la rivalo respektive. Kvankam tia aranĝo rolas same kiel tiu de la samflanka kanono, tamen al ĝi mankas fleksebleco, ĉiuflankeco kaj varieco kompare kun tiu de la samflanka kanono kaj ĝi ofte kaŭzas malvenkon. Tial lertaj ŝakludantoj malofte uzas ĝin.

Ĉ. Ĉevala duonekrano: Movi la ĉevalon sur la 2-a linio antaŭen al la 3-a kaj tiun sur la 8-a linio al la 9-a, kio estas nomata aranĝo de ĉevala duonekrano. Estas dekstra kaj maldekstra ĉevalaj duonekranoj. Oni ofte uzas la postan aranĝon. Ĝi celas movi la gvardianon kaj elefanton al la 5-a linio por cedi vojon al la ĉaroj. La mankoj de tiu formacio estas, ke la soldato sur la 5-a linio estas gardata nur de unu ĉevalo kaj facile forkaptebla de la rivalo, la du ĉevaloj malfacile moveblaj kaj la ŝakpecoj tro koncentritaj, kio donas al la rivalo ŝancojn de ofta atako kaj katenas siaflankan kontraŭatakon. La ludanto, faranta tian aranĝon, metas sian esperon de venko sur la mezan kaj lastan stadiojn de la ludo, tial ŝakludanto kun alta nivelo en la meza kaj

lasta stadioj ŝatas uzi tian formacion.

D. Palacgardantaj ĉevaloj: Movi la ĉevalon sur la 2-a linio antaŭen al la 3-a, la kanonon sur la 8-a linio dekstren al la 6-a kaj la ĉevalon sur la 8-a al la 7-a. Tia formacio havas certan kontraŭatakan forton, sed la ĉaro sur la 9-a linio estas malfacile uzebla, kio ofte faligas la ludanton en malfacilan staton (Vd. bildon 1).

E. Palac-trapasa ĉevalo: Movi la elefanton sur la 3-a linio antaŭen al la 5-a, la ĉevalon sur la 2-a linio al la 4-a kaj poste al la 6-a. Tia formacio povas kontraŭbatali ĉevalan ekranon, ĉevalan duonekranon aŭ centran kanonon de la rivalo. Sed la alia ĉevalo estas facile atakebla, tio malfortigas la defendon (Vd. bildon 2).


F. Reciproka antaŭenpuŝo de soldatoj: La antaŭa movfaranto movas la soldaton sur la 3-a linio antaŭen unu paŝon, ankaŭ la posta movfaranto faras tion. Tio povas evolui en formacion de ĉevala ekrano aŭ tiun de palac-trapasa ĉevalo. Ĝi povas kontraŭbatali malrapidan atakon de la rivalo. Se ambaŭ ludantoj ludas diskrete, la ludo ofte finiĝas per egaligo.

G. Kanona duoblo: La antaŭa movfaranto movas la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a, la posta movfaranto movas la kanonon sur la 8-a linio antaŭen unu paŝon por gardi la centran soldaton kaj poste la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 8-a por bari la dekstran ĉaron de la rivalo. Tia formacio estas originala, sed kateniĝema kaj malofte uzata.


Per ĉina puzzle oni povas elfari diversajn bildojn. Se vi kreis kontentigajn bildojn, ne forgesu informi nin por ke ni aperigu ilin en la rubriko "Amuzoj".

Korvo kaj Vulpo (puzlo)


1. Korvo bekas viandon sur arbo.




2. Al la arbo venas vulpo.




3. Dezirante manĝi la viandon, la vulpo diras al la korvo: "Via voĉo estas rava, ĉu vi povus kanti kanton por mi?"



4. La korvo kun ĝojo ekkantis, kaj tuj je la malfermo de la beko la viando falis surteren.




5. La viando fariĝis frandaĵo de la vulpo.




Bildo 2

NIGRA PARTIO



Solvoj por Amuzajeto de la lasta numero:



● La 4-an de februaro ĉinaj sciencistoj per raketo "Changzheng n-ro 3" sukcesis surorbitigi telekomunikan sputnikon kaj fiksas ĝin super la ekvatoro je 98 gradoj de la orienta longitudo. Ĝi estas la kvina telekomunika sputniko de Ĉinio. La sukceso refoje pruvis, ke Ĉinio posedas maturan teknikon de telekomunika sputniko kaj ankaŭ la kondiĉojn por servi al la internacia kosmonaŭtika merkato.


● Statistiko de la Tibeta Aŭtonoma Regiono raportas, ke la totala sumo de la importa kaj eksporta komerco superis 30 milionojn da usonaj dolaroj. La ĉefaj eksportaĵoj de Tibeto estas ŝaflano, ŝaflanugo, bovlanugo, raŭpofungo, fritilaria tubero k.s.

● Post kvinjara klopodado la 14 ekonomiaj ekspluataj distriktoj jam havigis al si necesan skalon. En tiuj distriktoj funkcias 615 entreprenoj kun investo de ĉina kaj eksterlanda kapitalo, kaj la totala sumo de fremdlanda investo atingis 1.06 miliardojn da usonaj dolaroj.

● Antaŭ nelonge industriaj robotoj de kvar tipoj elfaritaj de iu instituto sub la Ministerio de Kosmonaŭtiko kaj Aernavigacio de Ĉinio eklaboris sur la aŭtofabrika ĉenlabora linio. Tio markas la transiron de la ĉina roboto-tekniko de provado al praktika uzo.

● Ĉina Analiza Centro de Stimuliloj fondiĝis en

Robotoj sur ĉenlabora linio



la Farmacia Esplora Instituto sub la Ĉina Medicina Akademio. La centro faros analizon por la sportistoj de la Azia Sportkunveno en Pekino.

● La unua ĉina datuma banko por geosciencistoj estis establita en Lanzhou, ĉefurbo de nordokcidenta provinco Gansu. Pere de tiu banko oni povas informiĝi pri 1686 ĉinaj maljunaj kaj mezaĝaj geosciencistoj, iliaj lernohistorioj, de ili servataj institucioj kaj iliaj fakaj esploradoj.

● Post dekjara esplorado sciencistoj de Sichuan-provinco solvis la enigmon de malfacila generado de pando: 1) tro longa ciklo de ovolofalo kaj falo de antaŭmatura ovolo, kiuj malhelpas koncipiĝon; 2) mallerta mamnutrado al pando; 3) malmultaj preferataj manĝaĵoj kaj serioza anormala intesta strukturo de pando, kiuj kaŭzas facilan malsaniĝon kaj morton.

● Antaŭ nelonge ĉina sciencisto Qin Dahe de la Lanzhou-a Glacirivera kaj Frostotera Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj piediris tra la "relative neatingebla poluso" kaj atingis la plej altan stacion en Antarkto. Tie la temperaturo atingas -87.3°C. En tiu plej frosta loko sur la tero, tutjare hurlas neĝa ventego, kaj krome, malfacila vojo plenas de danĝeroj, tial neniu antaŭe piedire atingis la lokon.

Qin Dahe (la unua de dekstre) kaj aliaj ekspedicianoj





Wu Keli en Pekino

- En Parizo oficiale inaŭguriĝis konstruado de la Centro de Franca-Ĉina Interŝanĝo, la plej granda "Ĉina Urbo" en la mondo, projektita de meminstruita arkitekto Liang Kunhao. La "Ĉina Urbo" inkluzivas arkadon, kvaretaĝan urbomuran citadelon, setaĝan ŝipon, ĝardenon en Suzhou-ĝardena stilo, subteran aŭtoparkon kaj aliajn sume 16 konstruaĵojn. La centro okupas 9 992 kvadratajn metrojn da tero, kaj la totala areo de la konstruaĵoj estas 45 285 kvadrataj metroj.

- Per modernaj subakvaj fotoaparatoj, Ĉinio unuafoje fotis fiŝojn vivantajn 5 000 metrojn profunde en oceano. Tia fiŝo, simila al siluro, en longo de 20-30 centimetroj, havas triangulan kapon kaj okulojn degenerintajn eble pro troa malhelo en profunda maro.

- La urboj Wanding kaj Ruili de Yunnan-provinco, najbare al Birmo, fariĝos ĉi-jare la unuaj liberkomercaj distriktoj ĉe la landlimo. En tiuj du liberkomercaj distriktoj doganpago estos abolita, entreprenoj ĝuos liberan sinregistrigon, financa merkato estos aperta kaj la sekureco de depono de eksterlanda kapitalo estos garantiata.

- Lastatempe oni trovis en Zigong de Sichuan-provinco fosilion de dinosaŭra haŭto. La fosilio montras retecan liniaron, kian surhavas lacerto.

- Ok el la dek plej grandaj budhostatuoj en la mondo estas en Ĉinio. Ili troviĝas en Leshan, Rongxian, Pingshan kaj Tongnan de Sichuan-prov., Dunhuang kaj Yongjing de Gansu-prov. kaj Gao-xiong de Taiwan.

- Wu Keli, 88-jara, de Gansu-provinco sola bi-

ciklis tra la tuta Ĉinio en la pasintaj ses jaroj. Li estas la plej aĝa biciklovojaĝanto de Ĉinio.

- "Vilaĝo de Vidvinoj" reĝisorita de Wang Jin de la Filmstudio Zhujiang gajnis la premion de "Ora Pando" en la Sesa Montpeliera Festivalo de Ĉinaj Filmoj okazigita en la franca urbo Montpeliero.

- Statistiko de la Ŝtata Turisma Buroo de Ĉinio raportas, ke en 1989 24.5 milionoj da eksterlandanoj vojaĝis en Ĉinio, pro kio Ĉinio enspezis 1.81 miliardojn da usonaj dolaroj, la enspezo estis 80% de tiu en 1988. La Ŝtata Turisma Buroo preparos por eksterlandaj turistoj multajn interesajn distraĵojn: la Azia Sportkunveno de la 26-a de sept. ĝis la 7-a de okt. en Pekino; la Ĉina Turisma Foiro de la 7-a ĝis la 10-a de okt. en Ŝanhajo; la Ĉina Turista Aĉetado en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono, de la 26-a de sept. ĝis la 5-a de okt.; la Ĉina Arta Festivalo por Turistoj en Kantono, de la 24-a de sept. ĝis la 9-a de okt.; la Monda Turisma Tago en Fuzhou en la 27-a de sept. kaj la Ekspozicio de Elito de Ĉinaj Antikvaĵoj, en majo, en Pekino. La 20-an de februaro la Ŝtata Turisma Buroo de Ĉinio publikigis la "Provizorajn Administrajn Regulojn por Turista Sekureco". Tio markas, ke la administrado pri sekureco en turismo de Ĉinio estas legalizita.

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Franco	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Religiaj ritoj en Japanio

LA tradiciaj religiaj ritoj en la meza regiono de Japanio havas longan historion. En la lastaj jaroj, la religiaj ritoj kunfandiĝis kun folkloraj artoj, iom post iom perdis sian religian signifon kaj fariĝis amuzaj kaj interkontaktaj aktivecoj.

Malamiko-repuŝa tamburado, unu el tiaj aktivecoj, originas el foja milito en la historio. Oni diras, ke dum la milito la atakataj homoj, kun masko farita el arba ŝelo kaj falsa hararo el algo, tutforte tamburadis, profitante malluman nokton, kaj fine fortimigis la malamikojn. De tiam, la aktivecoj fariĝis tradicia rito.

La soleno de niĉomalfermo de la templo Zenkoji okazas en ĉiu sepa jaro kaj daŭras du monatojn. La budhistoj opinias, ke ili ne povos eniri en la paradizon post la morto, se ili ne pilgrimas fojon al la templo dum sia vivo. Tial, ĉiujare, kiam okazas la ceremonio, al la templo svarme venas pilgrimantoj el diversaj lokoj de Japanio.


Kulto al Shobu estas kulto al la animo de s-ino Shobu, belulino en la antikva Japanio. Ŝi vivis antaŭ 800 jaroj, unue servis en la palaco de mikado kaj poste monaĥiniĝis.

El ĉiuj kultaj aktivecoj de Nagojo, la parado de herooj okazigata aŭtune estas la plej bonvena. En la fronta vico de la paradantoj iras tamburfluta taĉmento de geknaboj en ŝalkiraso, post ĝi iras trupo gvidata de 3 lokaj herooj, kaj la trupon sekvas kolono de belaj floraj veturiloj kaj paradantoj kun floroj kaj fanfaro. La granda parado dronigas Nagojon en ĝojo. ■



En malamiko-repuŝa tamburado






Parado de herooj en Nagojo



En religia ceremonio



Religia rito

Yangxin-halo kaj “Postkurtena Regado”


Teksto de MU YI

Fotoj de GU HUA

KROM la tri antaŭaj kaj tri postaj palacoj sur la akso en la Imperiestra Palaco, la plej alloga konstruaĵo estas Yangxin-halo. Ĉar ekde la surtroniĝo de la imperiestro Yongzheng (1723-1735 en regado) Yangxin-halo anstataŭis Qianqing-palaccon en la rolo de grava restadejo de imperiestroj. La reala reganto de Ĉinio en la lastaj jardekoj de Qing-dinastio, imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) (1835-1908), despotis dum 48 jaroj pere de “postkurtena regado” en tiu halo.

La H-forma Yangxin-halo situas okcidente en la Imperiestra Palaco, sudokcidente de la interna parto destinita por la imperiestra familio. La interligitaj haloj estis ĉirkaŭitaj de flankaj ĉambroj. La imperiestroj plenumis oficon en la antaŭa halo kaj noktis en la posta.

PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



Yangxin-halo kun trono en la mezo estis loko, kie la imperiestroj akceptis korteganojn kaj altrangajn oficistojn. La orienta varma ĉambro de la halo estis loko, kie la patrinoj de la imperiestroj Tongzhi (Tongĝi) kaj Guangxu (Gŭangŝju) kunvenigis korteganojn dum sia “postkurtena regado”. La nuna dekoracio de la halo estis la originalo senŝange konservita el la tempo de ilia regado. La okcidenta varma ĉambro estis loko, kie la imperiestroj legis raportojn de siaj subuloj. Tie la imperiestroj ofte kunvenigis korteganojn por diskuti pri la ŝtataj aferoj kaj faris koncernajn decidojn. Sur la okcidenta muro de tiu ĉambro pendis nomlistoj de oficistaroj de lokaj registaroj, kiuj helpis la imperiestrojn dece enoficigi ilin.

Ŝirmita koridoro interligas la antaŭan kaj postan halojn. Imperiestra dormejo troviĝis kaj en la orienta varma ĉambro kaj en la okcidenta de la posta halo. Nun ili estas aranĝitaj laŭ la origina dekoracio. Tishun-halo oriente de la dormejo estis dormoĉambro de la imperiestra edzino, kiam ŝi kunvivis kun la imperiestro. Okcidente estas Yanxi-halo kaj flankaj ĉambroj, kie deĵoris kaj loĝis imperiestraj kromedzinoj.

Kiel supre dirite, Yangxin-halo estis kunligita kun “postkurtena regado” en la lasta periodo de Qing-dinastio.

La 20-an de aŭgusto 1861 la imperiestro Xianfeng mortis de mal-



Portreto de Cixi

sano. Li testamentis la tronon al sia sesjara filo Zaichun (t.e. la posta imperiestro Tongzhi) kaj nomumis 8 korteganojn helpantoj de la juna imperiestro. Sed la kliko estrata de la 27-jara Cixi, patrino de Zaichun, kaj Ci'an, edzino de la forpasinta imperiestro Xianfeng, ne volis forlasi la regpotencon. Ili konspiris en Yangxin-halo por puĉo kaj rezulte la ok helpantoj estis aŭ ekzekutitaj, aŭ ekzilitaj. Sukcesinte en la puĉo, la du imperiestraj patrinoj komplotis en konspiro por uzurpi la regpotencon en la formo de “postkurtena regado”.

Ĉe la pordo de la orienta varma ĉambro de Yangxin-halo pendis difana flava silka kurteno. La juna imperiestro sidis sur la trono antaŭ



Yangxin-halo

la kurteno, dum liaj du patrinoj sidis post la kurteno por aŭskulti raportojn de korteganoj kaj fari decidojn anstataŭ la imperiestro. Ĉar Ci'an estis cedema, tial fakte Cixi sola decidis la ŝtatajn aferojn.


Laŭ la kutimoj de la dinastio, kiam imperiestro estis 14-jara, li devis mem prezidi la ŝtatajn aferojn. Sed Cixi tro potenctenema ne volontis redoni la povon al la imperiestro. Nur kiam la imperiestro fariĝis 18-jara, Cixi kontraŭvole proklamis forlasi la regadon en la 26-a de marto 1873. Sed ŝi daŭre regadis kaj ofte intervenis en decidojn de la gravaj aferoj. Malkontentiĝis la imperiestro pri tio kaj pli kaj pli akriĝis la malakordoj inter la patrino kaj la filo. Jarfine de 1874, la imperiestro mortis de malsano en la orienta varma ĉambro de Yangxin-halo en la aĝo de 19 jaroj.

La imperiestro Tongzhi ne havis filon, kaj laŭ la destino de la im-

periestra familio de Qing-dinastio, oni devis adoptigi por li nominalan filon kaj heredigi al tiu la imperiestrecon, se tio okazus, do la edzino de Tongzhi devus transpreni la rajton de "postkurtena regado". Ĉar Cixi estis membro de la avina generacio kaj nature devis forlasi la rajton decidi la ŝtatajn aferojn. Por daŭre teni en sia mano la regpotencon, ŝi ne konsentis adoptigi por Tongzhi filon, kaj surtronigis la 4-jaran Zaitian, filon de sia fratino. Li ja estis la imperiestro Guangxu. Per multaj insidoj kaj konspiroj la du vidvinoj denove kaptis la regpotencon. En 1881 Ci'an mortis kaj Cixi sola regis super Ĉinio. Kiam la imperiestro Guangxu estis 19-jara, Cixi devigite duan fojon proklamis redoni la regpotencon al la imperiestro. Sed apogante sin sur sia klinko, kiun ŝi kulturis dum multaj jaroj, ŝi ankoraŭ regis esence, tial pli kaj pli akriĝis la konfliktoj inter ŝi kaj la imperiestro.

Pro malvenko de Ĉinio en la Ĉina-Japana Milito 1894 kaj grandskala agreso de aliaj landoj, pli kaj pli akriĝis la nacia krizo de Ĉinio. Burgaj reformistoj plurfoje peticiis al la imperiestro por reformado. Puŝate de la historia tajdo, la imperiestro Guangxu akceptis reformistajn pensojn kaj publikigis dekojn da dekretoj ekde la 11-a de junio 1898. La reformaj dekretoj inkluzivis ekonomion, militajn aferojn, kulturon, edukadon kaj politikon. La imperiestro ofte kunvenigis reformistajn oficistojn en Yangxin-halo por interkonsiliĝi pri reformado. La reformaj rimedoj alprenitaj de la imperiestro reprezentis la interesojn de la nove leviĝintaj burĝoj kaj malutilis al la feŭdismaj konservativuloj estrataj de Cixi.

Nokte de la 20-a de septembro 1898, Cixi sekrete revenis de la Somera Palaco rekte al la Imperiestra Palaco. Ŝi sin entrudis en Yangxin-




La plafono kun skulptita ora drako en Yangxin-halo



Lito por imperiestro

Foto de **LUO WENFA**



La orienta ĉambro de Yangxin-halo, kie la imperiestraj patrinoj faris postkulan regadon Foto de **LUO WENFA**

halo, skoldis la imperiestron kaj fermis lin en kadukan ĉambreton. Tuj poste ŝi dekretis en la nomo de la imperiestro, ke ŝi revenos al la regado kaj plenumos la oficon en Yangxin-halo. Ŝi ordonis murdi 6 gravajn reformistojn kaj malliberigis la imperiestron sur malgranda insulo en Nanhai-lago okcidente de la Imperiestra Palaco. Jen komen-


cigis la triafoja "postkurtena regado" de Cixi.

En la 48 jaroj sub la regado de Cixi Ĉinio komplete fariĝis duonfeŭda kaj duonkolonia lando.

En novembro 1908 Guangxu kaj Cixi mortis en du sinsekvaj tagoj. Kaj la tri-jara Puyi surtroniĝis kaj la fakta reganto estis Longyu, edzino de la forpasinta imperiestro

Guangxu.

En oktobro 1911 eksplodis revolucio kaj pluraj provincoj proklamis sin sendependa de la registaro de Qing-dinastio. La 12-an de februaro 1912 Longyu subskribis dekreton pri abdikado de la imperiestro Puyi ĝuste en Yangxin-halo. Jen finiĝis la 2000-jara feŭdisma imperiestra regado en Ĉinio. ■



Dormoĉambro de imperiestro en la posto halo

En Sanxi-halo, kie imperiestro Qianlong konservis kopikaligrafiajn



Memoraĵoj por la 40-jara jubileo de EPC

